

El

人民中國報道

POPOLA CINIO

3
1 96 2






Printempo de la Vivo

Ĉarmas

per Buntaj Koloroj

1. Kiu estos la gajnanto?
2. Probable iu el ili fariĝos mondfama violonisto.
3. En librejo por infanoj en Pekino.
4. Ili sopiras la maron.
5. Amatoroj de la radio.



Mi Ekkonis Mian Mision en la Kvindeka Jaro

La verkinto de la jena artikolo, propre nomata Ŝu Ŝeju, estas unu el la fame konataj verkistoj de Ĉinio. Li naskiĝis en Pekino en la jaro 1899. Ekde 1924 li lekiadis pri la ĉina literaturo en la School of Oriental Studies de la Londona Universitato, kaj tie li verkis siajn tri unuajn novelojn. Reveninte en la patruon en la jaro 1930, li daŭrigis sian verkadon kaj instruadis en universitatoj. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, li sin dediĉis al organiza laboro de la tiama Kontraŭjapana Ligo de Tutlandaj Verkistaj kaj Artistaj Rondoĵoj. En la jaro 1940 publikigis lia fama romano "Kamelo Hiangzi". Nun li estas popola reprezentanto al la Landa Popola Kongreso kaj prezidanto de la Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj de Pekino. Post la Liberiĝo en 1949, li verkis tre multe kaj estas alnomata fekunda verkisto. La jena artikolo estas skribita de li por rememorigi la 20-jaran datrevenon de la publikigo de la "Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an" de Prezidanto Maŭ. Laŭŝe el la sperto de veterana verkisto elskribis en tiu ĉi artikolo siajn opiniojn pri tiu grava verko, kiu unuafoje en la historio de la ĉina movado de revoluciaj artoj kaj literaturo klare kaj profunde elmontris por ĝi novan direkton, la direkton por laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

— La Red.

KIAM mi unuafoje lernis la verkon de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, mi jam atingis la aĝon de kvindek jaroj. Tiu brila verko de literatura teorio donis al mi novan vivon en mia literatura studado.

Plum-laborantoj kia mi kiu aĝas pli ol duonon de jarcento, ofte suferas de du kutimaj malsanoj: konservativismo kaj anemio. La karakterizaĵo de la "konservativismo" estas la vojsulko malfacile ŝanĝebla, jam formita preskaŭ senescepte, en la pensado kaj sentimento, en la vivkutimoj kaj konceptaro pri la homa vivo. Precipe al tiuj kiuj jam iom famiĝis per siaj verkoj aldoniĝas plie memkontentiĝo al ilia konservativismo. Kaj tiu de la "anemio" estas tio ke la vivsperto kiun ili akumulis de la infaneco jam forkonsumiĝis iom post iom dum senĉesa verkado, kaj en la novaj aferoj ili ne emas enmiksiĝi, tiel ke fariĝis ĉiam pli malplena ilia kapo kaj ĉiam pli sterila ilia plumo kaj same kiel la aŭtoroj iliaj verkoj ankaŭ suferas de anemio. Ne mankas tiaj anamnezoj* en la literatura historio: antaŭe realismaj verkistoj fariĝis dekadencistoj, simbolistoj aŭ mistikistoj ktp., abomenante la realon kaj sindediĉante al esplorado de fantazia mondo. Estis aliaj kiuj ne havis intereson por la novaj aferoj kaj novaj homoj, sed simple sopiris ekskluzive al la pasinteco; ĉio aktuala estis por ili nur nigraj nuboj kaj sole rememorado al la malnovaj tempoj donis al ili iom da dolĉo. Kiam mi estis kvindekjara, al mi ankaŭ komencis aperi iom post iom la simptomo de la du

malsanoj en mia koro aŭ de tio ke mia vivo de verkisto probable estis finiĝonta. Sed mi lernis la verkon de Prezidanto Maŭ kaj ekvidis antaŭ mi vastan mondon, kiu subite sin prezentis kvazaŭ vilaĝo kun densa salikaro kaj helkoloraj floroj kaŝita post rokmuroj. Tie estas laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, estas sennombraj popolanoj kaj neelĉerpeblaj materialoj por verkado. Antaŭe mi estis kvazaŭ limako trenanta sin tien kaj reen sur mallonga muro. Nun, se mi nur volas, mi povas kontaktiĝi kun la altaj montoj kaj grandaj riveroj, kun sennombraj viroj kaj virinoj kaj kun la gigantaj ondoj kaj tajdo de la revolucio. Kiom ajn konservativa mi estu, mi ne povas ne antaŭeniri kun ĝojo por vidi la vastan novan mondon kaj trovi novan fonton de materialoj por verkado.

La Paroladoj de Prezidanto Maŭ faris mian koron serena kaj mian vidkampon vasta, ke mi sentas min kvazaŭ subite elirinta el la urba muro en kiu mi estis tiom longe enfermita, kaj surpaŝinta larĝan ŝoseon kaj vidinta antaŭ mi lazuran akvon, verdajn montojn kaj fekundan kamparon senliman. Ke la literaturo kaj arto devas servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kiel pledite de Prezidanto Maŭ, tio ne malvastigas la sferon de la literatura kaj arta kreado sed ĝin plivastigas, tio ebligis al mi vidi la senlime belan perspektivon kaj ankaŭ ekhavis mi antaŭe neniam havitan idealon tute novan. Mi ricevis neniam spertitan kuraĝigon kaj inspiron tiel ke mia krea entuziasmo multobliĝis. Mi forgesis

Ronduizito al Historiaj Lokoj en Interna Mongolio

INVITITE de k-do Vu Lanfu, mi vizitis la Aŭtonoman Regionon de Interna Mongolio la pasintan someron kune kun la historiistoj Fan Venlan, Lju Ĝenju k.a. La rondvizito daŭris proksimume du monatojn (de la 23a de julio ĝis la 14a de septembro) kaj la irita vojo longis pli ol 7500 kilometrojn. Estas neeble elskribi ĉiom de la rikoltoj dum la vizitado, oni tamen povas resumi la rikoltojn per kelkaj tre koncizaj vortoj: "Ni vidis kion ni neniam vidis

antaŭe kaj aŭdis kion ni neniam aŭdis antaŭe." Jen mi iom skribu pri tio kion mi vidis kaj aŭdis dum mia rondvizito al la historiaj lokoj en Interna Mongolio.

Kie Estas Troveblaj Tiaj Poemoj

Por historiistoj, Interna Mongolio estas loko multe alloga, ĉar dum la longegaj historiaj epokoj ĝi estis ĉiam la historia scenejo de vivo kaj agado



mian aĝon kaj ekvolis konkuri en laborado per skribiloj kun la junaj kolegoj. Tio estis la kaŭzo de tio ke mi estis kalkulebla kiel unu el la fekundaj verkistoj dum la pasintaj dekkelkaj jaroj. Ne ĉiuj miaj verkoj estas bonaj, sed mi tute ne malesperiĝis pro tio. Mi estas lernanta, t.e., mi lernas verki el la materialoj kaj laŭ la formoj, neniam antaŭe uzitaj. Ne mankas malfacilaĵoj en tio. Sed la kuraĝigo, kiun mi ricevis de la verko de Prezidanto Maŭ plena de revolucia optimismo inter la linioj, instigas min maltimi la malfacilaĵojn kaj malsukcesojn. Li ne konsilas nin retroiri antaŭ la malfacilaĵoj sed strebi impete al la venko, konkerante plenenergie la malhelpojn. Lernu kaj senĉese lernadu, kaj tio turnos malvenkon en venkon.

senĉese kaj varme amos labori kiel la laboranta popolo kaj en tio mi plenumos mian devon kaj el tio mi ĉerpos mian vivĝojon. De dekkelkaj jaroj mi ne plu estas tiel soleca kaj ne tiel sencele vaganta izole en mallumo. Mi estas entuziasma kaj ĝojplena, ĉar mi akiris novan vivon de literatura verkado! Mi volas daŭre klopodi por min plenigi kaj hardi kaj pli bone servi al la popolo, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ.

Mi ne fariĝos pesimisma pro malvenkoj. Laŭ la direkto montrita de Prezidanto Maŭ, mi devas servi al la vastaj laborantaj popolamasoj per miaj literaturaj verkoj. Kaj kiom glora kaj grava tasko ĝi estas! Antaŭ la Liberiĝo mi estis mi mem, tute sola kun nenia interligiteco kun la aliaj. Mi estis kvazaŭ kompatinda lemno** pelata de la vento, supre ne pendanta sur la ĉielo kaj malsupre ne staranta sur la tero, kaj ne povis scii mem pri la propra destino. Sed nun mi scias ke mi devas enradikiĝi en la amaso. Mi ne plu estas "orfo", sed homo kun sennombraj amikoj, de kiuj mi lernas kaj el tio mi esperas, ke mi povos verki ion por ili utilan. Nur tiel mi trovas ke mia vivo ne estos vana. Prezidanto Maŭ admonas ke mi klare vidu mian devon, mian mision, miajn havendajn idealon kaj ambicion. Ne grave kiom ajn malsufiĉa mia literatura talento estos, mi diligentos



Maŭ Zedong:

**Paroladoj ĉe la
Literatura kaj
Arta Kunsido
en Jan-an**



Formato: 13.2×18.7
Prezoj: bd. rb. 0.22; £0-1-9
br. rb. 0.09; £0-0-9

Mendu ĉe niaj diverslandaj perantoj aŭ rekte al nia Administracio: P. O. 313, Pekino, Ĉinio.

* Rakonto de paciento pri la pasintaĵo de sia malsano.
** Lemna peucicostata, vegetaĵo flose vivanta sur la akva surfaco de lagetoj.

de la nomadoj, kaj la historiaj agadoj de tiuj nomadoj estis ankaŭ gravaj konsistigantaj partoj de la ĉina historio. Iuj el la agadoj eĉ ne povas ne okupi ĉapitrojn en la monda historio.


De iu nekonata antikva tempo la hun-oj jam eniris en Internan Mongolion. En la periodo de Kindingastio (221-207 a.K.) aŭ pli frue, ili aperis kiel forta tribo en la historio. Poste la hianbej-oj, la tugjue-oj, la ujgur-oj, pliposte la kitan-oj, la njuĝen-oj, kaj laste la mongoloj — tiuj nomadoj eniris en tiun ĉi regionon kaj supreniris la historian scenejon unu post alia kaj ankaŭ malaperis el tiu ĉi regiono kaj forlasis la historian scenejon unu post alia. Tiuj nomadoj, kiuj aperis en la regiono de Interna Mongolio sinsekve aŭ samtempe, flugpasis en la historio kvazaŭ agloj kaj la plejparto el ili forflugis nere-trovebla, postlasante nur malmulte da historiaj ruinoj aŭ restaĵoj dislokitaĵoj inter dezertaj herboj kaj rakontantaj siajn pasintajn glorojn. Iuj postlasis eĉ neniun historian ruinion, kaj nur en la historiaj dokumentoj estas troveblaj mallongaj notoj pri ili. Sed ĉiuj ĉi tiuj nomadoj ludis mirindajn historiajn teatraĵojn en Interna Mongolio aŭ en pli vasta tereno. Iuj, ekzemple la mongoloj en la dektria jarcento, eĉ donis mondskuajn ordonojn de tie ĉi.

Forpasis jam pli ol dumil jaroj. Hodiaŭ la regiono de Interna Mongolio jam eniris en novan epokon de la historio. La nacimalplimulto loĝantaj tie ĉi, kiel la mongoloj, la dahur-oj, la olunĉun-oj, la ovenke-oj k.a., estas trapasantaj grandan historian transformon senprecedencan, irantaj de malsamaj historiaj stadioj kaj malsamaj vivmanieroj en la socialisman socion laŭ malsamaj vojoj. Ekzemple, la mongoloj eniras en la socialisman socion de feŭda socio en kiu nomadado estis la ĉefa vivmaniero, dum la olunĉun-oj kaj ovenke-oj de la lasta stadio de primitiva komunisma socio en kiu ĉasado estis la ĉefa vivmaniero. Multaj el tiuj kiuj estis paŝtistoj aŭ ĉasistoj nun fariĝis ŝtallaboristoj. Ke ĉiuj vojoj kondukas al la socialisma socio estas plej konkrete kaj vivece klarigita ĉi tie.

“La mondhistorio estas la plej granda poeto,” diris F. Engels. En Interna Mongolio ni vidis majstran verkon de la plej granda poeto. Anstataŭ kantoj de orioloj aŭ hirundoj, troviĝas en la verko la batalado de multaj agloj kaj la galopado de sen-nombraj ĉevaloj. Ĉu estas troveblaj tiaj imponaj grandiozaj poemoj en la biblioteko de mondliteraturo?

Parto de la Plej Antikva Granda Muro

Post kiam la vagonaro trapasis Gjujong-pasejon kaj veturis iom da zigzaga montvojo, sterniĝis antaŭ ni vasta ebenejo kies randon oni ne povas vidi eĉ per lorno. Jen estas la loko kiun la antikvuloj nomis “Transgrandmura Regiono”.



La Blanka Pagodo, antikva konstruaĵo de Huhehaŭte.

Foto de Huabaŭ

La tutan vojon de pli ol mil lioj de Gjujong-pasejo ĝis Huhehaŭte kuris la vagonaro tra tiu ĉi vasta altebenaĵo. Ni ĉiuj supozis ke ni vidos ambaŭ-flanke de la fervojo pejzaĝon “transgrandmuran” kiel flavan sablon kaj blankajn herbojn, sed ni trovis tie nek flavan sablon nek blankajn herbojn sed nur fekundajn kampojn kun diversaj plantaĵoj: tritiko, fagopiro, rizo, sorgo, batato, beto, k.t.p. Se ne estus tiuj kelkaj stepoj rezervitaj tie kaj tie por kontentigi la bezonojn de paŝtado, ni suspektus ke la vagonaro veturigas nin en Hebej-ebenejon.

Preterpasinte Gining, ni malklare vidis montĉenon kurantan de la nordoriento sudokcidenten. Ĝi estas la montaro nomata Jinŝan en la antikva tempo aŭ Dakingsan en la nuna. Dakingsan estas montĉeno ne alta sed tre vasta, kiu dividas kiel muro Internan Mongolion okcidente de Gining en du partojn. Estas rimarkinde ke la naturaj kondiĉoj norde kaj sude de la montaro estas absolute malsamaj. La norda flanko de la montaro estas onda altebenaĵo kun malgrandaj ondiĝoj malkovrata al la malvarmega norda vento, dum la suda flanko estas longa sed malvasta fekunda ebenejo protektata de Jinŝan.

La du urboj Huhehaŭte kaj Baŭtoŭ estas konstruitaj ĝuste sur la fekunda ebenejo ĉe la suda montpiedo de Dakingsan. La aŭtuna Jinŝan estas kvazaŭ bronza ekranego lokita norde de ili. La verdegaj montdeklivoj treniĝanta malsupren de la montsupro de Jinŝan kuŝas senzorge ĉe la bordo de la Flava Rivero, kaj baniĝas en la sunbriloj. Kia kvietaj ebenejo ĝi estas! Sed tiu ĉi kvietaj ebenejo estis ĉiam la plej ŝtorma loko dum la historiaj periodoj kiam la rilatoj inter la nacioj estis streĉaj.

Jam en la Epoko de la Militantaj Regnoj (475-221 a.K.), la ebenejo ĉe la suda piedo de Dakingsan laŭ

la norda bordo de la Flava Rivero estis la fokusa loko de interbatalado inter la reĝo Vuling de la regno Ĝaŭ kaj la hu-oj. En la interbatalado la reĝo Vuling de la regno Ĝaŭ venkis la hu-ojn, okupis tiun ĉi ebenejon kaj konstruis grandan muron ĉe lia norda landlimo por bari la enpenetron de la hu-oj en la ebenejon. Nun troviĝas la restaĵo de parto de antikva granda muro, etendiĝanta intermite sur la montpintoj ĉe la suda flanko de la montaroj Dakingsŝan, Vulaŝan kaj Langŝan kun longeco de pli ol ducent sesdek lioj de la orienta ĝis la okcidenta fino. Laŭ la lokiteco ĝi estas ĝuste la restaĵo de la granda muro de la regno Ĝaŭ.

Dum nia vizito al Baŭtoŭ, ni supreniris Dakingsŝan nordokcidente de la urbo por vidi la tian parton de la granda muro de la regno Ĝaŭ. Ĝia alteco atingas proksimume kvin metrojn. Ĝi estas konstruita el ramfirmigita tero kaj la tertavoloj estas ankoraŭ klare distingeblaj. Rigardante ĉu orienten aŭ okcidenten, mi povis vidi neniun finon. Ĉe la orienta parto de la muro estas malklare videbla ruino de antikva fortikaĵo, kiu montras ke tie estis siatempe strategia loko.

Dum nia ekskurso al la granda muro de la regno Ĝaŭ, mi verkis poemon prilaudantan la reĝon Vuling kaj donis al li la honoran titolon heroo, kiun li ja meritas. Ĉiuj scias ke la Komenca Imperiestro de Kin-dinastio, kiu nur kunligis la antaŭajn grandajn murojn de la regnoj Kin, Jan kaj Ĝaŭ kaj faris aldonon per la homfortoj kaj materialoj de la tuta lando, jam kaŭzis ĉie nesubpremeblajn plendojn. Sed Reĝo Vuling de la malgranda regno Ĝaŭ povis sub la tiamaj materialaj kaj teknikaj kondiĉoj plenumi tian grandiozan konstrulaboron de nacia defendo sen esti malbenata. Tio estas ja admirinda.

Ĉe la Piedoj de la Montaro Dakingsŝan


Nun ni forlasu la grandan muron de la regno Ĝaŭ kaj iom preparolu la citadelojn laŭlonge de la montaro Jinŝan.

Laŭ arkeologiaj raportoj, estas trovitaj tre multaj ruinoj de antikvaj urboj ĉe la norda kaj suda piedoj de la montaro Jinŝan, almenaŭ dudek kelkaj. Tiuj antikvaj urboj plejparte apartenis al la periodo de la Okcidenta Han-dinastio, kelkaj al la Norda Vej-dinastio aŭ pli malfrue. La plejparto de tiuj antikvaj urboj lokiĝas ĉe la enirejoj de la valoj ĉe la suda piedo de la montaro kondukantaj al ĝia norda flanko, aliaj ĉe la norda piedo de la montaro kaj ankoraŭ aliaj ĉe la transirejoj de la Flava Rivero kaj la nordorienta parto de Ordos. Laŭ la situoj de la antikvaj urboj ni vidis ke ĉe la suda enirejo de preskaŭ ĉiu grava valo kondukanta al la nordo de Jinŝan estis konstruita citadelo. Precipe ĉe Skolopendro-digo norde de la hodiaŭa Huhehaŭte, kaj des pli ĉe la breĉo inter Dakingsŝan kaj Vulaŝan norde de Baŭtoŭ, la ruinoj de citadeloj estas pli multaj. Verŝajne tiuj ĉi du valoj estis la ĉefaj invadaj trairejoj de la antikvaj nomadoj kaj de la hun-oj en Han-dinastio. Verŝajne en sia strategia aranĝado ĉe Jinŝan Han-dinastio starigis almenaŭ tri defendliniojn: la unua ĉe la nordaj enirejoj de la valoj aŭ pli foraj lokoj, la dua ĉe la sudaj enirejoj de la valoj, kaj la tria ĉe la transirejoj de la Flava Rivero kaj la nordorienta parto de Ordos.

Dum nia vizito al la okcidenta parto de Interna Mongolio, ni ekskursis al la ruinoj de la antikvaj urboj de Han-dinastio ĉe Tabon-tolgaj apud Huhehaŭte kaj Maĉihiang-o¹ apud Baŭtoŭ.

Tabon-tolgaj situas ĉe la suda piedo de Dakingsŝan, ĉ. tridek kilometrojn nordoriente de Huhehaŭte. La antikva urbo estas ortangula, dividita en du partojn, la internan kaj la eksteran. La periferio de la ekstera urbo longas tri kilometrojn. Ĉie sur la tero de la interna urbo estas troveblaj pecoj de fajencaĵoj kun ŝnuraj strioj de Han-dinastio. Proksime de la urbo estas kvin grandaj teramasoj. Tabon-tolgaj signifas kvin grandajn teramasojn. Verŝajne la kvin teramasoj estas kvin grandaj tomboj kovritaj de teraĵo. Se la kvin tomboj estos malfermitaj, tre kredeble povos esti trovitaj historiaj arkivoj de tiu ĉi antikva urbo.

Maĉihiang-o estas tridek liojn okcidente de Baŭtoŭ. Ankaŭ la antikva urbo ĉitiea dividiĝis en du partojn, la



La tombo de Vang Ĝaŭgjun.

Foto de Huabaŭ

internan kaj la eksteran. En la interna urbo ankaŭ dise troviĝas multe da brikoj kaj tegoloj de Han-dinastio, dum en la ekstera urbo troviĝas mal-multe. Ĉirkaŭ la antikva urbo estas multaj antikvaj tomboj, el kiuj la plej-parto estas ne terkovrita. El tiuj tomboj oni trovis multe da antikvaĵoj, inter kiuj estis moneroj de Han-dinastio kaj bronzaĵoj, fajencaĵoj, lakaĵoj k.a. laŭ la stilo de Han-dinastio. Ankaŭ estis multe da ajuraj ornamaĵoj el oro kaj arĝento apartenantaj al la kultura sistemo de la hunoj, kies desegnoj estas la figuroj de animaloj kiel tigroj, leopardoj, kameloj k.a. Krome estis trovitaj pecoj de tegolaĵoj kun ideografiaĵoj.

Mi ne volas detale rakonti al la legantoj la eltrovon de la du antikvaj urboj. Nur pri unu fakto mi volas elmontri ke la antikvaj urboj de Han-dinastio ĉe la norda kaj suda flankoj de Jinŝan kaj la transirejoj de la Flava Rivero estis konstruitaj ne pro ekonomiaj sed pro militaj kaŭzoj. Por diri ekzakte, tiuj antikvaj urboj estis efektive ne veraj urboj, sed nur kazernoj por starigi garnizonajn trupojn kaj konservi provianton kaj armilojn. Tiuj kiuj loĝis en tiuj citadeloj estis ĉefe trupoj. Krome ankaŭ estis etkomercistoj kaj metiistoj, sed ili dependis de la trupoj por sia vivtenado. Se la trupoj nur retiriĝis, tiuj citadeloj estis ankaŭ forlasitaj.

Mi volas elmontri ankaŭ ke la regiono de Jinŝan estis batalkampo kiam la rilatoj inter la nacioj estis streĉaj, kaj grava stacio de kultura interfluo kiam la interrilitoj malstreĉiĝis. Eĉ ankaŭ dum la militaj tempoj, la interfluo de kulturo ne povis esti tute haltigita. Pri tio klarigas al ni la historiaj restaĵoj trovitaj ĉi tie. Ekzemple, ĉie sur la tiama landlimo inter la han-oj kaj la hun-oj estas troveblaj moneroj kaj meti-produktaĵoj de Han-dinastio. La meti-produktaĵoj estas ĝuste la samaj kiel tiuj de la sama

Rajdarto estas tradicia ŝato de popolanoj de Interna Mongolio.

Foto de Huabaŭ



Ŝafaro sur la fekunda stepo Hulunbuir.

Foto de Huabaŭ

periodo eltrovitaj en la internolando. Tio klarigas la fakton ke la paca interkomunikado inter la han-oj kaj hun-oj ne estis tute obstrukcita de la Granda Muro kaj la militaj citadeloj.

Nur unu historia restaĵo ĉe la piedo de Dakingshan estos por eterne konservita. Ĝi estas la tombo de Vang Ĝaŭgjun, alinome la Verda Tombo. En la koroj de la popolanoj de Interna Mongolio, Vang Ĝaŭgjun estas jam ne plu homestaĵo, sed simbolo, simbolo de amikeco inter nacioj kaj la tombo de Vang Ĝaŭgjun estas jam ne plu tombo, sed historia monumento de amikeco inter nacioj.

La Verda Tombo situas proksimume dek kilometrojn sude de Huhehaŭte. Oni diris, ke en la komenco de King-dinastio ankoraŭ troviĝis antaŭ la tombo du vicoj da ŝtonaj tigroj kaj unu ŝtona leono, kaj krome estis ankoraŭ restaĵoj de verdaj glazuritaj tegoloj. Verŝajne ekzistis origine antaŭ la tombo sanktejo por fari oferojn. Hodiaŭ ĉio ĉi tio estas ne plu trovebla, escepte de unu ŝtona tigro kaŭranta apud la ŝtuparo por akompani la malproksimen edzinigitan knabinon.

La Lulilo de la Nomadoj

La "pejzaĝon transgrandmuran" ni ne vidis en la okcidenta parto de Interna Mongolio, sed ni vidis en ĝia orienta parto. Kiam nia vagonaro transiris la Grandan Hing-an-montaron kaj eniris Hulunbuir-stepon, la naturo komencis impresi per sia mongolieco.

Ĝuste kiel la montaro Dakingshan dividas la okcidentan parton de Interna Mongolio en nordan kaj sudan partojn, tiel same la vasta Hing-an-montaro etendiĝanta de nordoriento sudokcidenten disigas Hulunbuir-stepon en orientan kaj okcidentan partojn. Ambaŭ ĝiaj montpiedoj estas tranĉitaj de sennombraj ne ege ondiĝantaj valoj. La riveretoj elfluantaj el tiuj valoj enfluas respektive en la stepojn oriente kaj okcidente de Hing-an-montaro. Tiuj en la orienta parto kunfluigas en Nen-riveron, dum tiuj en la okcidenta parto en Hajlar-riveron.



Ĉe foiro sur Hulunbuir-stepo.

Foto de Huabaŭ

Kvankam la urbo Hajlar situas en la stepo, tamen loĝante tie, ni ne havis la senton esti en la stepo. Nur kiam ni veturis en aŭtomobilo sur la ŝoseo kondukanta tra Nantun al Hini-rivero, ni vidis veran stepan pejzaĝon. Sur tiu ĉi ŝoseo mi vidis por la unua fojo tiel ebenan, vastan kaj liberspacan stepon, sur kiu neniu iam kulturis de la pratempo kaj kiu neniam apartenis al iu ajn individuo kiel privata posedaĵo. Troviĝas nek montoj, nek arboj, nek vilaĝoj sed nur verdverdaj herboj kaj la lazura ĉielo kovranta la stepon. Nur kiam ni atingis Hini-riveron ni vidis kelke da grizaj feltotendoj. Ili estas la hejmoj de la paŝtistoj de Buliejate-mongoloj. Ni vizitis la hejmojn de tiuj paŝtistoj kaj pasigis la plej gajan tagon sur la stepo.

Kompreneble ne ĉiuj stepoj estas tiel ebenaj kiel tiu ĉe Hini-rivero. Ĝuste sur la vojo de Hajlar ĝis Manĝoŭli, ni vidis ne ege ondiĝantajn sablajn montojn kaj ankaŭ kiam ni veturis de Manĝoŭli al Dalaj-lago kaj de Dalaj-lago al Ĝalajnor, ni vidis survoje iom da altajetoj kun malkrutaj deklivoj desegnantaj diversajn mildajn kurbliniojn sur la horizonto.

Hulunbuir estas ne nur la plej bona paŝt-regiono de Interna Mongolio hodiaŭ, sed ankaŭ la plej bona stepo de la antikva tempo. Tiu ĉi stepo estis ĉiam la historia lulilo de la nomadoj. La plejparto de la nomadoj kiuj aperis en la ĉina historio: la Hianbejoj, la kitan-oj, la njuĝen-oj kaj la mongoloj, ĉiuj kreskis en tiu ĉi lulilo kaj pasigis sian historian junecon ĉi tie.

La stepo Hulunbuir estis ne nur la historia lulilo de la antikvaj nomadoj, sed ankaŭ ilia armilejo,

proviantaĵo kaj soldatekzercejo. Utiligante la favoregajn naturajn kondiĉojn ĉitieajn, ili pligrandis sian popolon, armis sian armeon, kaj poste kun tiu ĉi loko kiel la deirpunkto konkeris de oriento okcidenten la aliajn tribojn en la meza kaj okcidenta partoj de Interna Mongolio aŭ pli vastan mondon kaj disvolvis siajn historiajn agadojn. Tiel same agis la Hianbejoj, kaj la kitan-oj, la njuĝen-oj kaj la mongoloj.

Post la okupo de tiu ĉi stepo la Hianbejoj anstataŭante la mongolojn fariĝis la reganta nacio en la mongolia regiono kaj pliposte enirinte en la basenon de la Flava Rivero starigis la Dinastion de Norda Vej. La kitan-oj, kiuj deiris de tiu ĉi stepo, poste ankaŭ disvastiĝis al la meza kaj okcidenta partoj de Interna Mongolio kaj fine fikse loĝiĝis en la baseno de la Flava Rivero kaj starigis la Dinastion de Liaŭ. Ankaŭ la njuĝen-oj, kiuj deiris de tiu ĉi stepo, poste eniris en la basenon de la Flava Rivero kaj starigis la Dinastion de Ĝin. Konkerinte la tartarojn kaj okupinte tiun ĉi stepon, Ĝengis-hano unuigis la diversajn tribojn de Mongolio en kelkaj jaroj.

Ĉifoje ni vidis en Ĝalajnor la antikvan tombaron de la hianbejoj kaj en Datong la kavernaron de Jungang postlasitan tie de ili kaj Huajan-templon postlasitan de la kitan-oj. En la orienta parto de Interna Mongolio ni vidis ankaŭ du de ili postlasitajn limmurojn kiuj longas po kelkcent lioj kaj la ruinon de unu el iliaj urboj. Ĉiuj ĉi tiuj estas postrestaĵoj postlasitaj de tiuj nomadoj sur iliaj antaŭenmarŝaj vojoj.

La Postkorto de Historio

Se la stepo Hulunbuir estis la movoplena strato de la ĉina historio, do la Granda Hing-an-montaro estis ĝia kvieta postkorto. La montoj leviĝantaj unu super alia kaj la densaj ĉiamverdaj praarbaroj kovrantaj tiujn montojn formis naturan barilon, apartigantan tiun ĉi lokon de la stepo Hulunbuir tiel ke la homoj loĝantaj ĉi tie estis disigitaj de la cetera mondo kaj konservis sian malnovan tradician vivmanieron dum la longegaj historiaj epokoj. Ĝis la Liberiĝo la olunĉun-oj kaj ovenke-oj, kiuj loĝis en tiuj ĉi arbaroj, ankoraŭ restis en la historia stadio de la lasta periodo de la primitiva socio. Sed post la Liberiĝo la kondiĉoj ĉitieaj multe ŝanĝiĝis. Nuntempe fervojo jam etendiĝis laŭ la valoj de la Granda Hing-an-montaro malproksimen en la profundajn partojn de tiu ĉi praarbaro. La barilo kiu obstrukcis la enporton de civilizacio disrompiĝis antaŭ la fervojo. La briloj de socialismo jam prilumas la tutan Grandan Hing-an-montaron.

Tiun ĉi fojon ni eniris en la Grandan Hing-an-montaron ĝuste per tiu ĉi fervojo. La vagonaro unue nin portis al Jakeŝi, la ĉefurbo de Higuju-flago², kaj ankaŭ la pordego por eniri la arbaran zonon de la Granda Hing-an-montaro. Higuju signifas arbarejon en la mongola lingvo. Tiu ĉi mongola geografia nomo registris la historiajn kondiĉojn de la loko, ĉar efektive hodiaŭ jam ne plu troviĝas arbaroj ĉe Jakeŝi.

Sur la vojo de Jakeŝi al Ganhe, niaj rigardoj sin turnis de la vasta stepo al la sennombraj montpintoj droniĝintaj en la praarbaroj. Ambaŭflanke de la fervojo apenaŭ vidiĝis montdeklivo ne kovrita de arbaroj. Ĉie kreskas diversaj arboj, inter kiuj abundas larikoj kaj betuloj, kaj krome ankaŭ troviĝas davidianaj poploj³ kaj aliaj nekonataj arboj.


Ĉe Ganhe ni transvagoniĝis en malgrandan trajnon kaj daŭre antaŭeniĝis en la arbaran zonon. Post kelkhora veturado la trajno portis nin al la loko Numero Dudek-kvara. Tie ni elvagoniĝis kaj eniris la praarbaron. Ni pensis ke ni certe povastrovi en la praarbaroj antikvajn arbojn kiuj vivadas de miloj kaj miloj da jaroj. Sed efektive ne troviĝas tiaj longvivaj arboj. Larikoj vivas maksimume nur iom pli ol cent jarojn. La praarbaroj estas tiel nomataj ĉar tiuj arbaroj regeneras sin generacion post generacio de la pratempo, konservante ankoraŭ sian primitivan staton ĝis hodiaŭ. Kompreneble en la spongsimila humo pli ol unu futon dika, kiun ni surpaŝis, sin trovas sendube arboj kaj folioj putriĝintaj antaŭ dek aŭ kelkdek mil jaroj.

1. *Hiang-o*: Administra subdivido de gubernio.
2. *Flago*: Administra unuo en Interna Mongolio egala al gubernio.
3. *Davidiana poplo*: *populus davidiana*.

Por la unua fojo ni vidis ĉi tie tiel densajn arbarojn tra kiuj eĉ la sunradioj ne povas penetri, kaj ankaŭ por la unua fojo ni vidis azaleojn plenkovrantajn la montojn kaj la specialan muskon kiun la rangiferoj plej frandas. La aŭtuna suno prilumas senegoisme la seninterrompajn montojn kaj la densaj arbaroj vidiĝas bronze malhelverdaj en la sunlumo. Ĉe la montpiedo riveroj serpentumas tra la malvastaj valoj, kies ambaŭflankoj plene kovriĝas de verdaj herbejoj kaj dense kreskantaj salikoj. Kie oni povas trovi tiel belajn ĝardenojn en la mondo?

Nia vojaĝo ne ĉesis ĉe Ganhe. Ĝuste tiuvespere la trajno portis nin al la fina stacio de la fervojo Alihe, kiu estas la ĉefurbo de la Olunĉun-a Aŭtonoma Flago. En la manĉua lingvo Olunĉun signifas tribon kiu bredas rangiferojn. Sed hodiaŭ la olunĉun-oj estas jam ne plu tribo kiu bredas rangiferojn. Konstruite novtipajn domojn apud la rivero Ali, ili fiksas sian loĝadon ĉi tie kaj iom post iom ŝanĝas sian vivon ĉasistan en vivon fiksluĝantan.

(Daŭrigo sur p. 119)



La postkorto de historio — la Granda Hing-an-montaro.
Foto de Huabaŭ

Sur Vojo Kovrita per Freŝaj Floroj

Ilustraĵo de Jang Junking

POST kelkaj fojoj de la blovado de suda vento, jam ĉie ruĝas floroj kaj verdas herboj. Ĉe la bordo de la Suda Maro ŝajnas ke vintro simple ne ekzistas.

Hodiaŭ estas ferio de la komunumo kaj ankaŭ foira tago. Komunumanoj iras en grupoj al la foiro. Junulinoj kaj infanoj bunte vestitaj, kvazaŭ freŝaj floroj ŝutiĝas sur vojo kondukanta al la urbeto.

Mi estis ĵus transsendita matene el Liuki-a traktora stacio por labori en tiu de Nansan. Mi estis kondukanta traktoron kun tirata ĉaro da terpomoj kaj legomoj de la komunumo por vendi en la bazaro. Tuj ekster la vilaĝo, mi renkontis grupon da junulinoj. Ili ĉiuj ridis brue, foje eĉ pepkriis kaj gestadis kontraŭ mi. Mi volis iom imponi ilin, sed la traktoro ruliĝis nur tre malrapide. Spite de tio ke mi plivigligis la motoron malfermante plej larĝe la valvon de oleujo, la rapideco de la traktoro ne multe superis tiun de ŝarĝĉaro tirata de ĉevalo. Ho, kia traktoraĉo! Eĉ antaŭ la knabinoj ĝi ne volis rampi pli rapide. Dum mi estis en ĉagreno, renkonte kuris galope alia traktoro kun malplena ĉaro. Ĝuste tiam, unu knabo subite transiris la ŝoseon. Aj ja, danĝere! Mi tuj haltigis la traktoron. Meze de la timkrioj de la homamaso, la alvenanta traktoro rapide kaj facile turnis sin flanken kaj evitis la knabon. Sed pum! ĝi tuŝis oblikve mian tiratan ĉaron. La traktoro tuj ekhaltis. Tiu subita halto kaj lerta evito ja vekis mian admiron kaj respekton. La kondukisto sidanta sur la traktoro laŭte kriis: "Kies infano? Tute sen zorganto! Kie estas la patrino?" Nur tiam mi vidis ke la traktoristo estas junulino ĉirkaŭ dudekjara.

La juna patrino riproĉata de la amaso forportis surbrake la infanon. Nun la traktoristino returnis sian kapon kaj demandis:

"Ĉu vi estas nove alveninta kolego?"

Ne atendante mian respondon, ŝi klinis la oreilon kaj atenteme ekaŭskultis. Post longa momento ŝi al mi diris: "Via traktoro funkcias nebone."

Tion dirinte, ŝi saltis el la traktoro kaj klinante la kapon al la alt-prema oleo-pumpilo denove aŭskultis atente, kaj per sia mano ŝi pinĉpremis laŭvice la oleo-tubojn unu post alia, petante min ĉiufoje jen grandigi jen malgrandigi laŭgrade la malfermitecon de la oleo-valvo ripete. Tion mi faris laŭ ŝia peto kaj poste ŝi definitive diris:

"Unu el la risortoj de la oleo-pumpilo rompiĝis, ŝajne de la tria cilindro."

"Ke la traktoro funkcias nebone, tio estas fakto. Sed, ĉu vi povas esti certa eĉ de kiu cilindro rompiĝis la risorto?" mi ne kredis ŝian vorton. Ŝi rediris:

"Kredi aŭ nekredi vi mem decidu. Mi tamen timas ke vi ne povus surrampi la Ponton Erdu."

Mi ne povis min regi de kolero pro ŝia aroganta tono kaj diris:

"Se mi ne povos suriri, mi portos supren per miaj manoj la traktoron kaj tiratan ĉaron kun la varoj ĉiujn senescepte."

"Junuloj ja estas fieraj, kion oni povas fari!" Ŝi skuis la kapon, saltis sur la traktoron kaj ekturnis sian direktilon. Post kelkaj sekundoj ekfunkciis la motoro kaj brue forveturis la maŝino.

La komunumanoj, kiuj sidas en mia tirata ĉaro por gardi tie la varojn, interbabilis:

"La nuntempaj knabinoj ja kapablas transloki monton kaj elverŝi maron, vidu la imponecon de tiu knabino!"

"Kaj ŝi estas krome sufiĉe bela!" aldonis iu junulo kun admiro.

Malgraŭ mia kolero, la traktoro pli kaj pli malrapidiĝis. Nur post pli ol duon-horo mi fine atingis la Ponton Erdu. Mi pensis en mi: se mi ne povos suriri la ponton, povus esti ke la risorto de oleo-pumpilo vere rompiĝis. Iel ajn, ĉiuokaze mi petos la teknikiston Hu fari ekzamenon, kiam mi atingos la urbeton. Dum mia pensado, alproksimiĝis vigla motorbruado de malantaŭo. La traktoro preterpasis la mian kaj surveturis la Ponton Erdu ventrapide. Oho! Estas ja denove tiu ino, kiu ĵus kontraŭparolis min. Tirante ĉaron da varoj, ŝi jam kuris antaŭ min.

Sur la ponto, ŝi haltigis sian traktoron, poste ŝi returnis sin kaj rigardis min, kun kapo ripozanta sur la maldekstra mano apogita sur la direktilo. Hm! Ŝi do volas vidi mian enembarasiĝon! Ĉu mi duagrada subtraktoristo laborinta jam du jarojn ne povus surveturi la ponton? Mi eĉ ne rigardis ŝin rekte. Mi pliforte funkciigis la motoron ĝis ekstremeco. Kvan-kam la traktoro kuris malrapide, ĝi tamen anhele surrampis parton de la deklivo. Kaj mi ŝajnis min trankvila, sed verdire, mi estis tre nervoza interne. Ju pli mi streĉiĝis, des pli mi sentis ke la traktoro veturas malrapide. Mi kaŝe ĵetis al ŝi rigardon. Ho! Ŝi fiksis la okulojn rekte al mi, nek parolante nek ridante. Kiaj grandaj okuloj! Mi pelis la traktoron supren colon post colo. Jen mi vidis kavon sur la vojo antaŭ mi kaj tuj turnis la direktilon, sed neebliis jam ĉirkaŭiri ĝin, kaj mia traktoro ekhaltis ĉe tio tute senmove — estingiĝis eĉ la fajro. Ŝvitoj min banis. Nun estas ŝia vico por parolo, kaj mi aŭdis ŝian alvokon: "Atendu!" En sekva momento ŝi petis la komunumanon sur sia tirata ĉaro eltiri la kroĉilon de la ĉaro kaj alligi sur la traktoron ŝtalkingblon. Tiam

trafe kaj lerte ŝi retromovis sian traktoron antaŭ la mian, kaj elsaltinte ŝi ligis mian traktoron per la kablo al la sia. Ŝi ree sursaltis tiel facile kaj vigle kiel hirundo. Ŝi antaŭkalkulis ke mi ne povos surgrimpi la ponton, kaj kunportis eĉ la kablون; sed mi pensis nur pri ŝia malicemo. . . .

Mia traktoro estis tirata malrapide sur la ponton, dume mi ankoraŭ stulte pensadis. Nur kiam ŝi jam alligis ree al sia traktoro la ĉaron kaj volis forveturi, mi ekdemandis ŝin:

“Kia estas via nomo?”

“Mia nomo estas Ĉang Tri,” ŝi ridis al si kaj aldonis: “Ne estos plu deklivo survoje al la urbeto. Malrapide vi povos veturi ĝis tie. Riparigu la traktoron kiam vi revenos.” Admoninte ŝi forveturis.

Mia traktoro malrapide sintrenis antaŭen kaj fine atingis la urbeton. Mi venigis Hu, kaj petis lin ekzameni mian traktoron por trovi la difekton. Li petis min funkciigi la motoron. Li klinis sian oreilon al la oleo-pumpilo, atente aŭskultis kelkan tempon, kaj pinĉepremis unu tubeton post alia per sia mano, petante min dume grade fermu kaj malfermu la ole-valvon kaj fine asertis:

“La risorto de la tria cilindro de altprema oleo-pumpilo estas rompita.”

La ekzamena maniero kaj la farita konkludo estas entute samaj kiel tiuj de Ĉang Tri. Mi frapis al mi la kapon kaj saltis el mia traktoro:

“Mi anoncu min kiel lernanton al la majstro!”

“Al kiu majstro vi anoncos vin?”

“Al Ĉang Tri! Mi diris kaj kuris en la homan amason. Antaŭ la vendejo de divers-koloraj ludbalonoj mi trovis Ĉang Tri. En ŝia mano estis du ruĝaj balonoj. Vidinte min ŝi donis unu al mi. Grupo da junaj traktoristinoj alvenis de nia dors-flanko kaj kriis: “Hie Ŝunking, brave, vi trovis novan amikon kaj nin forlasis.”

“Estas ne mirige do ke hodiaŭ ni ne trovis eĉ ŝian ombron alveninte al la urbeto.”

“Ne babilaĉu, alie mi batos vin. Li venis por labori en nia brigado ĉi-matene. Ĵus demetinte pakadon li jam transportis ĉi tien ĉaron da varoj.”

“Brigadestro Hie, ĉu tiu, kiu venas al nia brigado ‘Marto-oka’ estas viro aŭ virino?” demandis altastatura traktoristino, kun manoj sur la talio. Ŝi rekte rigardis al mi provoke.

“Ankoraŭ aliaj junuloj venos labori en nia brigado,” diris Hie Ŝunking.

“Ĉu tiam nia brigado ankoraŭ nomiĝos ‘Marto-oka’?”

“Mi jam faris interkonsenton kun la staci-estro: En nia brigado okazu konkurso inter viroj kaj virinoj. Se virinoj venkos, do, ni ankoraŭ portos la nomon ‘Marto-oka’, se viroj venkos, ni alinomos nian brigadon ‘Junula’.”

Mi silentis apudstarante. Je la unua renkonto de konkurso mi jam estis venkita.



Dimanĉo de Pekino

K-do Macumoto Masao estas japana esperantisto kaj literatura kritikisto. Li plurfoje vizitis nian landon. Ĉi tiun artikolon li skribis en 1961.

—La Red.

Nun, mi estas en la kvina etaĝo de la Hotelo de Nacioj, tio estas la sesa etaĝo laŭ japana kutimo. Mi ŝatas elrigardi tra fenestro de mia ĉambro, precipe por vidi pekinajn stratojn vivofreŝajn de mateno ĝis vespero. Aŭtobusoj traruliĝas, multaj bicikloj kaj ŝarĝaŭtoj traruliĝas, kaj ĉiaj veturiloj traruliĝas tra la stratoj viklece.

Tamen, la sceno ekstere sub la fenestro, kiun mi vidas hodiaŭ, estas malsama ol tiuj en la ordinarnaj tagoj: maljunulo tenante per la mano infanon—eble sian nepon—paŝadas malrapide; paro de junaj geedzoj, kun du infanoj inter si, plezure promenas unu apud alia. Mi vidas ankaŭ ĉirkaŭ dudekjarajn fraŭlon kaj fraŭlinon ĝentile kaj serene babilante movadas siajn piedojn; kaj trans la strato sub la arbombro ludas knaboj kaj knabinoj.

Mi jetas rigardon al la kalendaro sur la tablo: hodiaŭ estas la 25-a de junio, dimanĉo. Ho, hodiaŭ estas dimanĉo de Pekino!

En la 11-a de junio, ni transiris la landlimon kaj surpaŝis angulon de la vasta liberigita lando de la Ĉina Popola Respubliko. En tiu momento, mi spertis tian emocion, kvazaŭ ankaŭ mi mem estus liberigita el la subpremado de imperi-

ismo. Tion mi komunikis al miaj kamaradoj, kaj ĉiuj diris ke ili havas la saman animstaton kiel mi.

Trapasinte Kantonon ni atingis Pekinon. Vizitante kaj aŭskultante por vidi kaj aŭdi pri la konstrua laboro de la granda nova Ĉinio, ni travivis la lastajn dek tagojn kvazaŭ en sonĝo. Hodiaŭ, en la malofta neokupateco, mi hazarde vidas tra la fenestro tiun ĉi serenon kaj sanan scenon sube sur la strato.

La ĉina popolo dum la longdaŭra historio de sia lando ĉiam suferis turmentadon de la malamikoj enlandaj kaj eksterlandaj. Ne longe post kiam Japanio lanĉis la maljustan rabistan militon por invadi Ĉinion, mi vizitis Pekinon. Rememorante pri la tiama situacio de la popoloj ĉina kaj japana inkluzive min mem, mi vere emociiĝas senlime.

Pekino restas la sama Pekino de la antikveco, tamen ĝi fariĝis jam alia ol la antaŭa. Jam pasis pli ol dudek jaroj, la du Pekinoj, kiujn mi vidis kaj vidas, estas samaj kaj ankaŭ malsamaj. Jam de antikveco Pekino estas fame konata kiel bela ĉefurbo. Kiel nekompareble bela kaj kiel forte alloga estas tiu ĉi malnova ĉefurbo por vojaĝantaj vizitantoj! Pekino, ankaŭ nun estas tre bela, ĉirilate Pekino restas la sama kiel antaŭe; tamen, al Pekino okazis grandega ŝanĝiĝo.

Estas konstruitaj aŭ konstruataj multaj monumentaj konstruaĵoj simbolantaj la gigantan disvolviĝon de socialisma konstruado. Kompreneble tio estas treege admirinda. Sed certe ne nur tion, ĉi tie ni vidas plie la mienon de liberigo de la popolamaso. Ankaŭ

tio estas ege miriga por ni. Ĉu tio ne estas ĝuste revolucia kreaĵo pli granda ol ĉio alia?

Ferminte la fenestrojn mi eliris eksteren. Apud la hotelo estas la Kultura Palaco de Nacimalplimulto, antaŭ kiu homoj promenas tri-kvinope aŭ ĝuas spektaklojn sur la strato. Kaj ankaŭ iuj promenantoj sidas ripozante sur la ŝtonaj terasoj ĉe ambaŭ flankoj de la ŝtuparo antaŭ la pordego de la Kultura Palaco. Jen sceno de kiom senzorga libereco!

Du junuloj, verŝajne laboristoj, sin fotografis unu la alian. Kiam mi proksimiĝis al ili, unu el ili subite ion diris al mi, kaj transdonis al mi la fotografilon.

“Ĉu vi bonvolus fotografi nin ambaŭ kune?”

Mi tute ne scipovas la ĉinan lingvon, sed mi komprenis ke tion diris la vortoj de la junulo. Mi kapjesis kaj akceptis la fotografilon, kun la Kultura Palaco kiel la fono, mi alĝustigis la fokuson de la lenso kaj premmovetas la obturilon de la fotografilo.

“Dankon, dankon!” Ili diris kredeble en tiu senco, kaj foriris.

Tio estas nur bagatelo okazinta sur la strato.

“Ĉu tiuj du junuloj scias ke mi estas japano?” mi pensis, kaj ne povis certiĝi. Eble ili ne sciis ke mi estas gasto el Japanio. Mi parolis nenion, kompreneble ili povis el tio rimarki ke mi estas fremdulo. Mi detale tion pripensis kaj venis al la konkludo: ili sciis ke mi estas japano, aŭ almenaŭ fremdulo, kaj petis min fotografi ilin.

Mia dimanĉo en Pekino multe ĝojigas min. Verŝajne nur hodiaŭ mi eksentas: ke la ĉina popolo jam akiris ĝisfundan liberigon.






Gong Gaŭĉu:

La Muzeo de Ĉina Historio

PLI ol naŭ mil valoraj historiaj-kulturaj objektoj kaj materialoj el kiuj la plejparton oni malkovris en la lastaj dekelkaj jaroj, post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, estas ekspozataj en la Muzeo de Ĉina Historio, kies inaŭguro okazis antaŭ nelonge. Ĝi estas miniaturo de la longdaŭra historio kaj brila kulturo de la ĉina nacio.

La muzeo stiuas ĉe Tian-anmen-placo en Pekino. Ĝi estis finkonstruita en aŭgusto de 1959. La ekspozita areo ampleksas pli ol ok mil kvadrat-metrojn. La ekspozitaĵoj estas aranĝitaj laŭ la periodoj de socia disvolviĝo kaj la dinastioj en la ĉina historio, ekde la tempo de primitiva amasloĝado antaŭ kvincent mil jaroj ĝis la Opia Milito en 1840, en tri partoj: la Primitiva Socio, la Sklava Socio kaj la Feŭda Socio.

En la parto pri la primitiva socio estas montrataj la historiaj objektoj el la periodo inter primitiva amasloĝado antaŭ kvincent mil jaroj kaj la disfalo de la primitiva klana komunumo antaŭ kvar mil jaroj. Inter ili troviĝas modelo de la fosilia kranio de la ĉina simio-homo (*Sinanthropus Pekinensis*) elterigita ĉe Goŭkoŭdian, proksime de Pekino kaj ŝtonaj iloj faritaj de la ĉina simio-homo, kaj spuro de fajro-uzado. La ekspozitaj fosilia kranio de la montsupra kaverno kaj ostaj pingloj el la tempo antaŭ kvar-aŭ kvin-dek mil jaroj pravas, ke ilia korpo kaj aspekto jam plejparte karakteriziĝas per la trajtoj de la moderna homo kaj ili povosciis jam tiam fari felan veston per kudrado. Aliaj ekspozitaĵoj, kiaj ŝtonaj kaj ostaj sagopintoj kaj pezpendaĵoj de fiŝreto el argilo kaj ŝtono el la tempo antaŭ dek mil ĝis kvin aŭ ses mil jaroj, pravas ke sagoj, pafarkoj kaj fiŝretoj jam inventiĝis en tiu tempo. De la objektoj, kiaj mili-grajnoj en la argila vazo elterigita ĉe Hi-an, Ŝenhi-provinco, la ŝtonaj falĉiloj elfositaj en la provincoj Henan, Ŝandong, Hebej, la rizgrajnoj en Anhuj-provinco, la ŝtonaj ŝpato, plugilo kaj tranĉilo en Siĉuan, Hingiang k.a. lokoj, oni vidas ke antaŭ dek mil ĝis kvin aŭ ses mil jaroj agrikulturo jam disvastiĝis en Ĉinio. La samloke ekspozata ŝpinrado el tiu sama periodo montras, ke ŝpin-teksado jam komenciĝis en tiu tempo. En la ekspozitaĵoj troviĝas ankaŭ ŝtonaj falĉilo, ŝovelilo, rado-faritaj fajencaĵoj el la tempo antaŭ pli ol kvar mil jaroj kiuj estis elfositaj en pli multaj lokoj de la lando kaj la kupraj objektoj elterigitaj ĉe Vuvej, Gansu-provinco ktp., pravas ke en la fina periodo de la primitiva komunumo, la produktaj fortoj de la vasta regiono en Ĉinio jam sin disvolvis ĝis certa grado.



Bronza vinujo kun kvar kapoj de kornegaj ŝafoj el la lasta periodo de Ŝang-dinastio (16-11-a jc. a.K.). Ĝi altas je 59.4 cm.


Foto de Huabaŭ

En la parto de sklava socio elmontriĝas objektoj kaj materialoj de la periodo ekde Hia-dinastio ĝis la Epoko de Printempo kaj Aŭtuno (do, de ĉ. 2100 a.K. ĝis 475 a.K.), kiuj montras ke privatposeda sistemo jam stariĝis en Hia-dinastio, kaj la formo de ŝtato jam ekĝermis tiutempe. Estas ekspozita modelo de maŭzoleo de iu aristokrata familio el Ŝang-dinastio, en kiu troviĝas sklavoj entombigitaj vivaj kun la mortinto. Tio ĉi klarigas, ke la sklava sistemo formiĝis jam en Ŝang-dinastio. Aliaj materialoj montras ke ribelo de sklavoj eksplodis fine de Ŝang-dinastio. Oni vidas ĉi tie ankaŭ multe da belaj kaj delikataj manfaritaĵoj kiaj bronzaĵoj, jadaĵoj kaj ostaj objektoj, kiuj atestas la brilan atingon de la bronza kulturo de la ĉina sklava socio. Estas videblaj inter la ekspozitaĵoj el tiu ĉi periodo ankaŭ fragmentoj de skribaĵo sur bestosto aŭ testudkiraso, historia materialo de la plej antikva skriba lingvo de Ĉinio, kaj klasikaj libroj de Konfucio, granda pensulo kaj

edukisto de la antikva Ĉinio, kaj la pentraĵo pri lia lekciado al disĉiploj sur la Abrikota Altano.


En la parto de feŭda socio estas elmontrataj kulturaj objektoj el la periodo ekde la Militantaj Regnoj ĝis la Opia Milito (475 a.K. — 1840). La Ge-o (halebardo) de Ŝang-Jang el la Epoko de Militantaj Regnoj, la ediktotabuleto de la Komenca Imperiestro de Kin-dinastio kaj la ŝtona plato kun surskribo starigita sur la monto Langja okaze de lia inspekta vojaĝo, konfirmas la historian fakton ke la Komenca Imperiestro metis finon al la stato de dis-apartigita teritorioj okupitaj de la feŭduloj, unuigis Ĉinion, kaj la unuafojon fondis feŭdan imperion kun centrigita potenco. Dum la periodo ekde la finaj jaroj de Kin-dinastio ĝis la Opia Milito, centoj da kamparanaj ribeloj, grandaj kaj malgrandaj, eksplodis en Ĉinio. Sigeliloj, moneroj, bataliloj kiujn uzis siatempe la trupoj de ribelintaj kamparanoj kaj fotoj pri la ruinaĵoj de antikva bataŭkampo kaj kopioj de ŝtongravuroj pri la milita disciplino de la ribelinta armeo estas ekspozitaj kaj multaj aliaj objektoj, spegulantaj kiaj severaj batoj estis donitaj de la kamparanaj bataloj al la feŭda regado, kaj ke ili ludis gravan rolon en antaŭenpuŝado de la ekonomia disvolviĝo de la ĉina socio.

La diagramoj kaj tabeloj pri la ferfanda centro de Ĉinio dum la Epoko de la Militantaj Regnoj kaj tiamaj feraj iloj elterigitaj en diversaj lokoj estas tie ĉi ekspozitaj. Ili montras, ke fero jam estis vaste uzata tiutempe en Ĉinio. Oni povas vidi inter la restaĵoj de ferfandejo el Han-dinastio, elterigitaj en Gong-gubernio de Henan-provinco, ian bruligitan karbon. Tio pruvas, ke Ĉinio jam fandis feron per karbo antaŭ pli ol du mil jaroj, ĝi estas grava por



Astronomia instrumento farita en la 11-a jarcento laŭ la principoj de tiaj instrumentoj pli fruaj.

Foto de Hinhua



registro de la historio de ferfando en la mondo. Ĉetere, oni vidas ĉi tie modelon de akvobaraĵo Dugiang, konstruita en la Epoko de la Militantaj Regnoj, foton pri la restaĵo de la kanalo fosita sub inĝeniero Ĝengguo, modelon de ferfando kun blovado kaj ŝpinteksilon el la Orienta Han-dinastio, akvan radon el la tempo de la Tri Regnoj, plugilon kun kurba timono el Tang-dinastio kaj lignan ĉevalon uzatan por transplanti rizplantojn el Song-dinastio (per

Lekciado de Konfucio sur Abrikota Altano.


Pentrita de Hu Josi

rekompletigita modelo) ktp. Ili ĉiuj montras, ke la progresado de produktaj instrumentoj akcelas la disvolvigon de akvoutiligado kaj paŝo-post-paŝan leviĝon de la produkta nivelo de ĉinaj agrikulturo kaj meti-industrio. La belegaj kaj multkoloraj metiartaĵoj ekspozitaj markas la altan nivelon de la metiartaĵoj en la antikva Ĉinio. Inter ili sin trovas ekspozitaĵoj prezentantaj la teknikon de orumado kaj inkrustado de oro kaj arĝento el la Epoko de Militantaj Regnoj, kaj silkteksaĵoj, porcelano kaj lakitaj objektoj el Han-dinastio, trikoloraj fajencaĵoj, vakstinkuritaj teksaĵoj el Tang-dinastio kaj brokato, *kesi-o* (speco de teksaĵo kun kolora desegno) ktp. el Ming-dinastio kaj pli poste.

Estas elmontrataj multaj libroj, portretoj, leteroj, skribaĵoj k.a., kiuj konigas la vivon kaj atingojn de multaj pensuloj, politikistoj, militistoj, scienculoj, literaturistoj kaj artistoj en la ĉina historio. La kopiaĵo de pentraĵo sur silko el la Epoko de Militantaj Regnoj, penikoj, surbambua skribaĵo elterigitaj ĉe Ĉangŝa, Hunan-provinco kune kun la verkoj de la filozofoj Mencio, Mo Zi, Ĝuang Zi, Han Fej Zi kaj la poeto Kju Juan, reliefe montris disfloradon de literaturo kaj sciencoj en la Epoko de la Militantaj Regnoj karakterizata per konkurado de diversaj skoloj. Oni ankaŭ povas vidi inter la ekspozitaĵoj paperon el la Okcidenta Han-dinastio (efektivaĵo), kiu formas brilan ĉapitron en la historio de la ĉina kulturo, kaj prezentojn pri pulvo, kompasoj kaj la presarto per moveblaj tipoj — la tri gravaj inventoj de Song-dinastio.

La riĉaj ekspozitaĵoj pri diversaj historiaj periodoj en tiu ĉi muzeo, pruvas ke Ĉinio estas lando unuigita kaj multnacia kun han-nacio kiel centro kaj havas longdaŭran historion. Oni povas vidi el la kolorriĉaj kulturaj objektoj de kelkaj dekoj da nacioj, kiel la popoloj de diversaj nacioj kune kreis la brilan kulturon de Ĉinio.

La muzeo ankaŭ donas historiajn bildojn pri interrilatoj kaj ekonomia kaj kultura interfluo de Ĉinio kun fremdaj landoj per multaj valoregaj kul-



La unua tertrema mezurilo de la mondo kreita de Ĝang Heng en 132 a.K. Kiam okazas tertremo en konsiderinda distanco, ĝi faligas la globon el la buŝo de unu drako en la buŝon de unu rano indikante la direkton de la tertremo.

Foto de Hinhua

turaj objektoj. Sur unu reproduktita peco de Dunhuang-a Murpentraĵo estas bildigita sceno de vojaĝo de Ĝang Kian el la Okcidenta Han-dinastio kiu iris al la okcidentaj landoj kiel sendito, kaj malfermis la "silkan vojon" kondukantan al la Meza Azio. En multaj objektoj kaj materialoj ankaŭ registriĝis kultura kaj komerca kontaktiĝoj inter Ĉinio kaj Koreio, Vjetnamio, Birmo, Japanio, Hindio, Indonezio, Kamboĝo, Afganio, Nepalo k.a. landoj kaj la plioftiĝanta interrilatado kun aziaj kaj afrikaj landoj depost Ming-dinastio. Troviĝas inter tiuj kulturaj objektoj ankaŭ fotoj pri la postsignoj de kulturaj interfluo en la antikveco inter Ĉinio kaj tiuj ĉi landoj, kiujn oni elterigis en Indonezio kaj aliaj landoj. La ekspozitaĵoj de bildoj kaj objektoj pri la repreno de Tajvano fare de Ĝeng Ĉengong, spegulas la heroan reziston kaj lukton de la ĉina popolo kontraŭ la eksteraj agresantoj.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

Nova Verko de Profesoro Feng Joŭlan

Lastatempe, la fama ĉina filozofo Feng Joŭlan, profesoro de la Pekina Universitato verkas diligente novan libron *Nova Historio de la Ĉina Filozofio*. La libro dividiĝas en tri volumoj kun ĉirkaŭ miliono da vortoj. Jam estas finskribita kaj transdonita al presejo la unua volumo entenanta 300 mil

vortojn. Ĝi temas pri la periodo de Ŝang-dinastio (1700-1200 a. K.) ĝis la fino de la Militantaj Regnoj (403-221 a. K.). La aliaj du volumoj estos finskribitaj en tiu ĉi jaro.

La Unua Duetaga Pasaĝera Vagonaro en Ĉinio

Ekde la sepa de marto k. j. la unua duetaga vagonaro por pasaĝeroj en Ĉinio kuras sur la

Pekin-Ŝenjang-a Fervojo. La eksterajo de tia vagono similas al longa sed mallarĝa duetaĝa domo. Interne de la vagono sin trovas seĝoj pli grandaj ol tiuj de la ordinara trajno kaj ili estas ĉirkaŭturneblaj kun risorta sidkuseno, kaj ilia dorsapogilo estas klinigebla, kio ebligas al la pasaĝeroj ripozi duonkuŝe. La plej alta projektita rapideco de la trajno estas 140 kilometroj pohore.

Urbo de Floroj kaj Muziko

LA vagonaro fluge kuris kaj portis nin al Kantono, urbo de floroj en la suda Ĉinio.

Kelkajn tagojn antaŭe, kiam ni forlasis Pekinon por suden veturi, la ĵurnaloj de la ĉefurbo ankoraŭ anoncadis prognozojn pri vetero de vintra fino: “sensuna, kun neĝo”, “8 gradoj sub la nulo”, kaj neĝis de tempo al tempo. Sed nun, kiam ni alvenis Kantonon post longa vojaĝo de pli ol 2,300 km. tra duona Ĉinio, ni trovas ĉi tie tute alian pejzaĝon: viglas la printempo kaj ridas la floroj.

Ĝuste hodiaŭ, la 3-an de marto, tagon baniĝantan en varmetaj briloj de la suno, inaŭguriĝis la “Muzika kaj Flora Festivalo de Kantono” ame nomita Kapra Urbo de la kantonanoj laŭ antikva legendo.

“Muzika kaj Flora Festivalo”. Kia poezia nomo! Kvankam ĝi ne estas la sama kiel la flora foiro de la Printempa Festo, dum kiu oni ekspozicias diversajn florojn sur stratoj kaj en muzikhaloj por elmontrado kaj vendado, tamen ĝi ne estas nur bela nomo simbola. Rigardu, ĉu Kantono ne estas per si mem granda ĝardeno, en kiu neniam velkas la floroj kaj arboj?

En Kantono, paletro, kies ĉefa tono estas freŝa verdo, oni povas vidi, en ĉiuj sezonoj de la jaro, diversajn brilajn kolorojn. Multloke staras altaj arboj kun floroj. Jam komencas flori la bombaksa* floro, kiu estas nomata “urba floro de Kantono”. La bombakso, plena de ruĝaj floregoj, ĉiam staras kun rektigita talio super la apudaj arboj. Pro tio, oni donas al ĝia floro belan nomon “heroa floro”. La eleganta emblemo de la “Muzika kaj Flora Festivalo de la Kapra Urbo” projektita de artistoj ĝuste montras ruĝan bombaksan floron kaj blankan antikvan Pan-fluton ore borderitan. Inter la strataj florarboj nun ankoraŭ floras cerciso (*cercis chinensis*), pul-

La Ensemblo de la Popola Liberiga Armeo ĥore kantas ĉe la Muzika kaj Flora Festivalo. Foto de Hinhua



ĉerima (*euphorbia pulcherrima*)... Se oni faras promenadon en iu ajn parko, oni povas tie vidi pli multe da floroj, diverskoloraj kaj bonodoraj: plene florantaj rozo, magnolio, printempa orkideo (*cymbidium virescens*) kaj laŭro eligas densan aromon. La azaleo, tropeolo, kamelio, dianto... ĉarmas per siaj riĉaj koloroj. Promenante inter tiuj floroj, oni sentas, kvazaŭ la aero estas miksitita kun ebriigaj eroj de parfumo kaj alkoholo.

La kunligo de muziko kaj floro estas vere lerta aranĝo. La floro kaj muziko estas laboremaj kaj bravaj fratinoj, tre favorataj en Kantono, kiu nomiĝas pro tio urbo de muziko kaj floroj. Per jenaj versoj verkisto priskribis la feliĉon de la kantonanoj, kiuj la florojn konstante ĝuas:

*Ne gravas ĉu printempo iras for,
Neniam ĉesas la pompad' de flor'.*

La tago 3-a de marto estas elektita por la inaŭguro de la Muzika kaj Flora Festivalo, ĉar ekzistas pri tio kortuŝa historio:

La guangdong-provincanoj estas kantemaj. Ili havas multe da specialaj tradiciaj festotagoj por kantado kaj dancado. La 3-a de marto estas ankaŭ popola kantfesto, en kiu la gejunuloj de la nacio Li, en la regiono Hajnan, amon serĉas kantante. Ĉiujare en tiu tago, kiam la printempaj sunbriloj varmete karesas kaj la floroj malfermas siajn petalojn, junuloj kaj junulinoj amase suriras montdeklivojn post la sunsubiro. Kantante aŭ fajfante ĉarmajn popolkanthojn, ili, kun plena fido, atente serĉas por si amaton. Kiam tio estas trovita, la geamantoj pare iras inter la arbojn kaj florojn, kantas unu al alia kaj interŝanĝas korajn vortojn. Tia tradicia festo por kantado kaj dancado okazas preskaŭ ĉiumonate. Oni diras, ke en la “Festo de Abaŭ” de la nacio Ĝuang, la kantado daŭras de la 15-a de januaro ĝis la 3-a de marto. La “Mezaŭtuna Kantkunveno sur la Perla Rivero” estas kantfesto de kantonaj surriveraj loĝantoj. Ĉiujare kiam alvenas la festotago de Mezaŭtuno, ili ornamas siajn boatojn multkoloro, kunvenas sur la Perla Rivero kaj konkuras per la kantado de “surakvaj kantoj”. La loĝantoj sur la bordo ankaŭ partoprenas la kantadon. Tio prezentas scenon ege viglan. En iuj vilaĝoj en la norda parto de Guangdong-provinco, estas kutimo okazigi “kantkunvenon de fratinoj”. Oni diras, ke ĝi estas festa muzikagado, en kiu kamparaninoj elkantas siajn korajn vortojn. . . Tiu ĉi kantama tradicio daŭras ĝis nun kaj pli fekundigas la teron, sur kiu kreskas la muzikaj floroj de Kantono. Al Hian/ Hinghaj** la

muzikon jam inspiris la lulkantoj de lia patrino kiam li estis ankoraŭ infano. Nun, ne estas afero tre malfacila trovi en la vilaĝoj violonon por organizi malgrandan orkestron. En la urboj, la koncerto estas kultura agado plej ŝatata de la popolamaso. Ĉifoje, la biletoj de la "Muzika kaj Flora Festivalo" elĉerpiĝis tuj kiam oni komencis ilin vendi. Por kontentigi la postulon de la popolamaso, la koncertoj daŭros ankoraŭ kelkan tempon. Krome, oni aranĝos muzikajn kunvenojn en placoj kaj parkoj, aŭ la muzikistoj iros al la aŭskultantaro por ludi sian programon antaŭ ĉi tiu.

La gastamaj mastroj de la Kapra Urbo sendis leterojn kaj telegramojn al Pekino, Ŝanhajo, Vuhan kaj aliaj lokoj, invitante la tieajn muzikistojn al sia festivalo. Poeto de la Kapra Urbo skribis:


*Glacion ne konas ja nia rivero,
Ĉe floroj kaj arboj eternas prospero.
Amikoj ho karaĵ, jam venu kaj gastu ĉe ni.*

.....

*Al la Kapra Urbo venu,
Kamaradoj, partoprenu
Kantadon pri l' printempo de l' patri'!*

La gastoj alvenis de ĉiuj direktoj. Famaj muzikistoj alveturis de centoj da kilometroj malproksime, per aviadilo aŭ vagonaro. Ili kunportis al la festivalo korajn bondezirojn kaj riĉan programon. Al la inaŭguro de la festivalo, Lju Gi*** entuziasme dediĉis sian poemon improvizie.

Ma Sicong*** venis kiel gasto kaj ankaŭ kiel mastro. Li diris al mi, ke en la festivalo li kaj lia 15-jara filo ludos kune la violonan dueton de Reminoro de Bach. Kiam mi vizitis la hotelon kie li loĝis, la patro kaj filo estis provantaj la ludon.



Ma Sicong kaj lia filo ludas kune la violonan dueton de Reminoro de Bach. Foto de Hinhua

He Luding*** diris: "Vere mi ŝatus esti migranta birdo por flugi al Kantono po fojo en ĉiu jaro."

Dum ĉi tiuj tagoj, afiŝoj pri la festivalo reklamas ĉie sur la stratoj de Kantono. En la festivalo partoprenos ĉiuj amatoraj muzikistoj kaj muzikaj grupoj kun sia programo. Inter ili troviĝas la amatora violonisto Pu Ĉilong, entomologo kaj profesoro de Jatsen-a Universitato, kiu tre bele ludas la *Printempon en Hingiang*. Tiu ĉi maljuna sciencisto, kvankam ĉefe interesiganta pri laboro en la laboratorio, profitas ĉiun liberan momenton por ludi sian violonon. La *Suda Tagjurnalo* faris la jenan priskribon pri li: "Por partopreni en la ludo en la festivalo, li tuj vigliĝas kvazaŭ printempa papilio ekperceptinta la aromon de la floroj."


Ĉi-nokte, por festi la inaŭguron de la festivalo, la tuta urbo estas iluminata diverskolore kvazaŭ en granda festo. Miloj kaj miloj da loĝantoj, kunvenante antaŭ radioriceviloj kaj televidaparatoj, ĝuas la ravan muzikan programon, aplaŭdante, ĝojkriante. . . .

La preludo de la "Muzika kaj Flora Festivalo de la Kapra Urbo" komenciĝis.

* *Ceiba pentandra.*

** *Konata progresema ĉina muzikisto, komponinto de la multe ŝatata "Kantato pri la Flava Rivero".*

*** *Ĉinaj konataj muzikistoj.*



Gimnaziaj dua-klasanoj de la Kantona Muzika Instituto prezentas per pibaoj la "Arion de Printempo" komponitan de ili mem. Foto de Hinhua

La Centra Instituto por Nacioj

ĈIUMATENE, la gestudentoj el 51 nacioj de la Centra Instituto por Nacioj en Pekino vigliĝas kun ridoj kaj kantoj. Portante kun si legolibrojn kaj skribilaron, ili gaje paŝis al la lernodomegoj ĉinstilaj.

Mi iris suden laŭ la asfalta vojo, al la domego de la lingva fakultato. El la klasĉambroj surporde kun la surskriboj "Unua klaso manĉulingva", "Dua klaso mongolalingva" . . . ŝvebis voĉo de legado en diversaj lingvoj: tie la gestudentoj estis lernantaj lingvojn diversnaciajn. Kiam mi alvenis en la administrejon de la fakultato, vicdekano Ma Hjueliang rakontis al mi pri la disvolviĝo de la lingva fakultato. Li diris ke por prepari lingvajn laborantojn de la nacimalplimulto, la instituto starigis la lingvan fakultaton jam en 1951, sed tiam en la instituto sintrovis nur kvar profesoroj kiuj povis doni lecionojn de la tibeta kaj ujugura lingvoj kaj estis ankoraŭ nenia kondiĉo por instruo de aliaj nacilingvoj. Parolante pri la nuna stato, li diris kun ekscitiĝo, ke la lingva fakultato jam ampleksas proksimume 800 gestudentojn kaj pli ol cent profesoroj el 37 nacioj kaj funkciigas kursojn de 22 naciaj lingvoj.

La Songô Realigis

Mi vizitis interalie la studenton Vej Anhiang, kava-naciano, kiu venis el la valo de Lancang-rivero. Hodiaŭ li jam povoscias sperte verki per sia kavalingvo. Antaŭ la Liberiĝo la kavaoj vivis tre primitivan vivon sub la teruraj klasa kaj nacia subpremado. Tiam li ankaŭ revis pri lernado kaj foje eĉ plenĝoje vizitis elementan lernejon fonditan de iu fremda misiisto, sed tie, krom preĝon, li ellernis nenion alian. Kaj hodiaŭ li estas jam duajara studento de la lingva fakultato. Li arde aspiris fariĝi instruisto post la diplomiĝo kaj laboradi la tutan vivon por la edukado de sia nacio.

En la instituto oni fondis ankaŭ kursojn pri geologio, meteorologio, mekaniko, geografio, kaj preparan kurson pri medicino. En la studĉambro de la geologia kurso mi intervjuis la tibetan knabinon Mimaĝeba. Tiu iama ŝafgarda knabino ĉe la servutmastroj eĉ ne scipovis skribi sian nomon kiam ŝi envenis la instituton. Oni instruis al ŝi unue la elementajn sciojn kaj poste sendis ŝin en la kurson pri geologio. Nun ŝi jam finlernis la fundamentajn sciencajn sciojn kaj la lecionojn pri paleontologio, historio pri la evoluo de geologio kaj ĝenerala geo-

logio. Ŝi sentis ke la scienco, kiun ŝi studas, estas bona kaj interesa kiel la magia arto por "transformi ŝtonon en oron per tuŝo", kaj montrante pecon post peco la ŝtonojn ŝi diris: "Tio estas plumforma kalkŝtono, tio marmora kalkŝtono". Ŝi diris ke dum sia infaneco kiam ŝi paŝtis ŝafaron en la montoj, ĉie ŝi vidis similajn malmolajn ŝtonojn, sed neniam ŝi songis ilin bone koni kiel nun. Kaj nun tion rememorante ŝi multe emociiĝis pro la minŝtonaj riĉfontoj, kiuj atendas nian ekspluatadon.

Naciaj Moroj kaj Kutimoj Estas Respektataj

Forpasis la lernohoroj de la tago, la kvietita instituto tuj fariĝis movplena. Gestudentoj du-tri-ope promenis, pridiskutis problemojn kaj legis ĵurnalojn. El arbaretoj aŭdiĝis de tempo al tempo kantoj en pluraj lingvoj. Sur la sportejo pilkokonkursas la miksciaj teamoj de pluraj nacioj. Kaj en la aŭditorio estis prezentado de la gestudentoj de la literatura fakultato. Iutage en la instituto estis pli ĝojbrue, ĉar la naci-

Hju Huj (huj-naciano), dua-klasanino de la historia fakultato malsaniĝas. Ŝiaj samklasanoj Jang Fengĝi (mongolia junulino) kaj Ĝang Hinĵong (gaŭŝan-naciano) venas ŝin prizorgi. Foto de Huabai



resta delegitaro de la nacimalplimulto alvenis por viziti siajn intimulojn. Gestudentoj en diversaj kostumoj svarmiĝis ambaŭflanke de la asfalta vojo kaj salutis la gastojn en diversaj lingvoj. Jen delegito de Hingiang tie renkontis filon de sia malnova amiko, jen delegito de Baj-nacio trovis la junulon el sia popola komunumo. La gestudentoj siavice konigis al la proksimuloj la ĝojan vivon de lernado kaj la amikan kunvivon de la diversnaciaj gejunuloj kaj la respektatecon al la naciaj moroj kaj kutimoj. Ili diris, ke iliaj vestoj estis faritaj de tajloroj speciale invitataj de la instituto. Laŭ diversaj manĝkutimoj la instituto starigis plurajn apartajn manĝejojn kaj la festotagoj de diversaj nacioj estis ankaŭ respektataj, ekz. en novjaro de la tibetanoj, oni aranĝis festovesperon kaj tiutage, la gestudentoj sin vestis per belaj kostumoj kaj la jarkomencon festis en ĝojaj dancoj kune kun la respondeculoj de la instituto. La instituto speciale konstruigis preĝejon por la islamaj studentoj kaj la sutro-konservejon por la studentoj kredantaj je lamaismo. Ĉio ĉi multe emociis la delegitojn. Tulsjunjuzi, delegito el Hin-



Gestudentoj de la Centra Instituto por Nacioj kolektiĝas por kanti kaj danci. Foto de Hinhua

giang, rigardante al la gajmienaj gejunuloj rememoris pri sia infaneco mizera sen ebleco viziti lernejon kaj ne deteneble laŭdis elkore: "Jen estas (Daŭrigo sur p. 127)

(Daŭrigo de p. 109)

Ĝalantun estis la lasta urbo de Interna Mongolio kiun ni vizitis.

Kiam ni alvenis al Ĝalantun, malaperis la atmosfero praarbara. Antaŭ ni vidiĝis bela monturbo kiu estas konstruita ĉe la suda piedo de la Granda Hingan-montaro. Verdaj altaĵoj troviĝas norde de ĝi. Tra la urbo fluas rivereto, kies akvo estas tiel pura kaj malprofunda ke oni povas klare vidi en ĝi la akvo-plantojn. La pejzaĝo ekster la urbo estas tre bela. Sur la vojo kondukanta al Hiuŝuj-pavilono oni povas vidi montetojn plene kovritajn de kverkoj kaj ankaŭ rivereton fluantan el la valo en kies fundo dense kreskas salikoj. Ĉie estas fruktarboj, legomĝardenoj kaj kampoj kie plantaĵoj estas kulturitaj. Ĉio ĉi tio montris ke ni jam atingis la agrikulturan distrikton de Hulunbuir. Kaj tie ni finis nian rondviziton al Interna Mongolio.

Historia Sekreto Malkovrita

Dum tiu ĉi rondvizito, mi povas diri, malkovriĝis al mi la historia sekreto, kial la plejparto de la nomadoj supreniris la historian scenejon de oriento okcidenten. Nun la kaŭzo jam estas tre klara. Tio estas ĉar en la orienta parto de Interna Mongolio troviĝas Hulunbuir-stepo. Se la tuta Interna Mongolio estis la historia scenejo de la nomadoj, do tiu ĉi stepo estis ĝia alivestejo. Multaj nomadoj finfaris sian tueleton en Hulunbuir-stepo, aŭ alivorte, sin ekipis en tiu ĉi stepo tiam ili elpaŝis el la scenej-pordo. Kiam ili elpaŝis el la scenej-pordo, ili estis jam ne nur aro da paŝtistoj, sed ankaŭ bone organi-

zitaĵoj kaj komplete armitaj kavaliroj kaj militistoj. Tiuj ĉi paŝtistoj, kavaliroj aŭ militistoj ĉiam intencis fari breĉon en la Granda Muro kaj eniri en la basenon de la Flava Rivero. Ĉu kun la ebenejo de la baseno de Liaŭ-rivero, aŭ kun la stepo Silinghol, sed ĉefe kun la ebenejo Ulanĉap kiel la bazo, ili frapegis la pordojn de la Granda Muro. Tial la regiono de Jinŝan estis ĉiam la loko kie kulminis la kontraŭdiroj inter la nacioj. Se tiuj ĉi nomadoj ne povis fiksi sian loĝadon ĉe la regiono de Jinŝan, ili daŭre marŝis okcidenten, provante penetri ĉe Gjujan en la basenon de Taŭ-rivero aŭ la stepon de Kinghaj. Se tiu provo denove malsukcesis, ili povis nur iri al la altebenejo Ĝunger kaj penetri tra la suda piedo de la montaro Tiansan en la sudan parton de Hingiang. Se ili renkontis reziston ankaŭ ĉi tie, ili povis nur iri pli foren al Meza Azio kaj meti sian esperon sur la baseno de Guj-rivero. Rigardate hodiaŭ, ĉiuj ĉi tiuj bataloj de kontraŭdiroj inter la nacioj estis serio da malfeliĉaj okazintaĵoj inter la nacioj, ĉar kiu ajn gajnis la venkon, ili estis katastrofoj aŭ tragedioj por la popoloj ambaŭflankaj.

"La formo de la plej lasta stadio de la mond-historio estos ĝia komedio," diris K. Marks. Nun la epoko de tragedioj jam forpasis por eterne, kaj vidiĝas en la regiono de Interna Mongolio la komedio historia. Sed la epoko de tragedioj estis historia epoko tute neevitebla, kiu intime ligiĝis kun la epoko de komedio. Por ke ni pli gaje adiaŭu la estintan epokon de tragedioj kaj pli bone kreu nian feliĉan estontecon, estas ja profitdone retrorigardi tiun pasintan epokon.

Du Boteloj da Vino

MIA patro estas drinkema. Li ĝojegis ĉiufoje, kiam mi hejmenrevenis el la urbo kun vino. En raviĝo li diris: "Mi volonte min detenus de unu manĝo, se nur vinon mi povus havi!" Tial estiĝis mia kutimo aĉeti botelojn da vino por paĉjo okaze de la Novjaro aŭ aliaj festtagoj.

Ekde lasta aŭtuno paĉjo fariĝis brutobredisto en la popola komunumo. Tial ankoraŭ longe antaŭ mia ĉifoja hejmenreveno por la Novjara Festo, mi jam diris al mi: "Nun des pli necese estas, ke mi aĉetu je hejmeniro vinon por paĉjo por ke li drinke forigu la frostecon post sia nokta kontroliro al staloj." Kun tia konsidero mi aĉetis du botelojn da vino.

Kiam mi atingis la hejmon, paĉjo ne estis hejme. Vidante la du botelojn da vino en mia mano, panjo tuj grumblis: "Por kio vi ree aĉetis tiom da vino!" Mi silentis, ĉar sian kontraŭstaron mi antaŭvidis. Jam de longe, panjo kontraŭis al la drinkado de paĉjo. Dum sia junaĝo, paĉjo estis homo kiu ne povis kaŝi siajn sentojn. Ĉiufoje kiam li estis trafita de malagrablaĵo, li tuj vizitis la malgrandan drinkejon en la vilaĝo. Pro tio kverelo ofte okazis inter paĉjo kaj panjo. Panjo ofte iris al la drinkejo por serĉi paĉjon kunprenante kun si la infanojn kaj lamentante: "Ho, mia sinjoro! Hejme eĉ ne estas rizo por manĝaĵon prepari, dume tie ĉi vi vin plenigas per la flava likvo! Malfermu viajn okulojn kaj ekrigardu al la ses-sep buŝoj atendantaj. . . ." Responde paĉjo nur ĝemadis kun klinita kapo. Post la Liberiĝo, nia vivstato multe boniĝis, kaj panjo ne plu tiel malaprobis la drinkadon de paĉjo kiel antaŭe, sed pro damaĝo de mono, ŝi konsilis ke paĉjo abstinu de drinkado. Patro respondis: "Abstinon de drinkado ankaŭ mi volas, sed neniel tion mi povas."

Eble ĉifoje, mi pensis, panjo ree damaĝis la monon kaj mi diris: "Panjo, ne zorgu pri tio! Krom drinkon paĉjo ne havas alian ŝaton, kaj du boteloj da vino ja ne tre multe kostas. Cetere, jam venas la Novjaro, do li iom sin distru. . . ."

"Ne, vi ne scias, ke paĉjo jam abstinis de drinko."

"Ĉu? Pro kio?" mi miris. Kaj panjo rakontis al mi la jenan historion.

Je lasta Nacia Tago, festeno estis aranĝita en la komuna manĝejo de popola komunumo. Paĉjo sidis ĉe la sama tablo kun kelkaj el siaj malnovaj amikoj. Ili bone sciis lian inklinon al vino kaj persvadis ke li multe drinku. Paĉjo danke rifuzis foje kaj refoje, sed li iom ebriiĝis kaj hejmenreveninte li tuj enlitiĝis. Tiam la porkino de la popolkomunumo ĵus naskis



Ilustraĵo de Huang Gongkjun

idojn antaŭ kelkaj tagoj, kaj paĉjo kutimis viziti la stalon almenaŭ du aŭ tri fojojn en ĉiu nokto. Sed tiun nokton, kiam li vekigis jam preskaŭ tagiĝis. Paĉjo haste rapidis al la porkstalo. Sed jam malfrue! Iu malforta porkido estis premmortigita de la porkino. Paĉjo ege bedaŭris pro tio. Li tuj kritikis sin antaŭ la publiko kaj skribis unu afiŝon, en kiu li certigis ke li neniam plu drinkos.

Mi estis kortuŝita de la historio ke paĉjo finfine abstinis de drinkado por la bono de la komunumo. Kaj mi iom bedaŭris ke vane aĉetitaj estas la du boteloj da vino. Mi metis unu botelon da vino en ŝrankon kaj sur ĝin la alian kiun mi intencis donaci al iu.

Tiam revenis paĉjo de sia laboro. Li tuj vidis la botelon sur la ŝranko. "Ĉu vino? Bone!" li kriis tiel ĝojege kvazaŭ li akirus trezoraĵon. Mi rigardis al panjo demande: Ĉu vi ne diris ke paĉjo abstinis de drinko? Verŝajne ankaŭ patrino tion ne atendis. Ŝi ekkoleretis: "Ankoraŭ ne foriĝis via malnova kutimaĉo, ke por vi pli kara estas la vino ol intimulo!"

"Kion vi scias, maljunulino! Bonaĵo ĝi ja estas!" Tion dirante paĉjo ekridis hehehe kaj lia vizaĝo disfloris kiel ruĝa krizantemo.

Mi ekpentis. Ja ĉio el mia kulpo. Eble paĉjo ne rompus sian abstinon de drinko, se mi ne lasus lin vidi la vinon. Sed mi pensis poste: Eble la certigon

paĉjo faris nur de momenta ekscitiĝo. Ja ne gravas iom drinki, se oni gardos sin de ĝia trouzo. Kaj certe paĉjo singardos.

Vespere mi proponis al panjo: "Panjo, varmigu por paĉjo iom da vino, ĉar pli malpli frue ĝi devos esti konsumita." Panjo konsentis. Sed baldaŭ poste mi aŭdis ŝin krii: "Ho ve! 'Frandedulino ne atendas ĝis finkuirado de viando', kiam la maljunulaĉo ŝtele fordrinkis la vinon?" Mi kontrolis. Ja restis nur la malplena botelo. Kiel komforte estas ĝui la vinon varmigitan sidante sur la lito! Kial paĉjo tiel malpacienas?

Ĝuste tiam paĉjo revenis kun ruĝaj vangoj kantante kaj brue paŝegante. Vidante lin, panjo diris malbonhumore: "Ĉu vi maljunulaĉo ankoraŭ povas hejmenreveni per propraj piedoj? La vinon vi ne lasis resti eĉ por ekrigardo, sed ĝin tuj forkonsumis!"

Sed paĉjo respondis kun neniom da kolero: "La vinon aĉetis mia filo. Vi absolute ne rajtas vin trudi en la aferon. Kaj ankaŭ laŭdon meritas nur mia filo," Li plenigis sian pipon per tabako, kaj daŭrigis fumante: "Juĉing, la vino bone efikas. Se ĝi estus

aĉetita de aliulo, certe mi jam lin honorigus per afiŝo."

"Paĉjo bone scias ŝerci..." diris mi. Tiumomente panjo eniris la ĉambron kaj ŝi intermetis: "Juĉing, ne parolu kun li! Lasu lin babilaĉi sola!"

"Ĉu babilaĉi? Sciu, tio ankaŭ estas subteno al agrikulturo!" Aŭdante la senordan parolon de paĉjo, mi sciis ke li ree ebriis kaj mi diris: "Paĉjo, vi iru iom dormi!"

"Ne, mi ankoraŭ devas iri al la stalo. Jam pasis sufiĉe da tempo, kaj eble tuj liveriĝos lakto." Tion dirante li frapis la pipon sur sia ŝuplando kaj eliris. . . . Ho! mi ekkomprenis nur nun! Mi ĝoje kriis al panjo: "Panjo, paĉjo uzis la vinon por prepari laktliverilon por la brutoj!"

Panjo eksemoviĝis dum momento, fine ankaŭ ŝi komprenis la fakton. "Ho, Kia artifikaĵo de la maljunulaĉo! Kial li ne diris al ni pli frue!" Ŝi tuj elprenis la alian botelon da vino el la ŝranko kaj ordonis min: "Rapidu al paĉjo!" Mi prenis la vinbotelon, fluge elkuris kaj laŭte postkriis: "Paĉjo, Vinon!"

Liu Hong:

Kurso pri Masaĝo por Blinduloj

INTERNE de etaĝa domo, eleganta kaj kvietaj, kiu situas en la orienta parto de Pekino, kuracistoj en blanko atente sinokupas je masaĝado al pacientoj. Ili knedas, premŝovas, pinĉas kaj premfrotas kun lerteco kaj precizeco. Ekster la kuracĉambro, atendantaj pacientoj ĝoje interparolas pri la kuraca efiko de la masaĝado. Tie ĉi estas la ekzercita kuracejo apartenanta al la kurso pri masaĝo por blinduloj de la Ĉina Ligo de Blinduloj kaj Surdmutuloj. Dum la pasintaj ses jaroj, tiu ĉi kurso jam edukis por nia lando pli ol cent masaĝkuracistojn blindulajn el kiuj la plejmulto estas revoluciaj militinvalidoj, oficistoj kaj studentoj postnaske blindiĝintaj. Kiel la blinduloj sukcesis fariĝi masaĝaj kuracistoj? Kun tiu ĉi demando mi vizitis la kurson.

Mi venis en la kuracĉambron de la juna ĉefkuracisto Hong Hjuebing, kaj observis lian praktikon. Inter liaj pacientoj, estis maljunaj ĝibulinoj kaj ŝancele paŝanta bebo suferanta infanan paralizon. Iuj venis por kuraci neŭrastenion, kaj aliaj, intest-stomakajn malsanojn. Enirante la ĉambron, ili nur salute vokis: "Sinjoro kuracisto Hong", aŭ informis: "Mi venas", kaj Hong Hjuebing povis tuj rekonii alparolintojn, kaj familiare demandis pri ilia sanstato. La diagnozado de la ĉina tradicia medicino estas praktikata per observo, aŭskulto, demando kaj pulsopalpado, kaj tiu de okcidenta medicino, per

brustaŭskulto, perkutado ktp. La blindulaj kuracistoj povas uzi ĉiujn ĉi metodojn krom tiun de observado. Ni vidis ke ĉiufoje kiam Hong akceptis pacieron por la unuafoja konsulto, li ĉiam almetis unue spegulon antaŭ la pacieron, kaj el rakonto de tiu lasta pri la koloro de sia vizaĝo kaj langsurfaco, ktp., li eksciis unuapaŝe la ĝeneralan simptomon de la malsanulo. La laŭteco kaj forteco de la voĉo dum interparolo de la paciento, la ritmo kaj eĉ odoro de

La blindula masaĝkuracisto Hong Hjuebing (maldekstre) en laboro. Foto de Hinhua



ties spirado ĉiuj servis al li kiel bazo por analizi la malsanon. Post tio, li faris plue diagnozon per pre-mado, t.e. premi per mano *hju*-ojn sur la *ĝinlo*-o.* Por iuj malsanoj, estas necesa ankaŭ la helpo de aliaj laborantoj por mezuri temperaturon kaj sangpremon, aŭ kunlaboro de alia hospitalo por fari laboratoriajn provojn, X-radian esploron ktp.

Por informiĝi pri la instrua metodo de la kurso, mi venis laŭ la voĉo de lekciado al la lernoĉambro de la studentoj de la kurso, kiu estis jam la kvina laŭ vico. Estis instruata la metodo de masaĝo. La studentoj palpegis per fingroj la reliefe punktitan tekston en brajlo, aŭskultante kviete la lecion de instruisto Ĝang Ĝeng pri la kuracaj principoj de la ŝultra neŭralgio per masaĝo. Ankaŭ Ĝang Ĝeng estas blindulo. Post la teoria klarigo, li instruis per praktikado. Unue, li faris diagnozon per "premo" sur iu *hju*-o nomata *jangĉi* de unu studento, kaj poste pinĉe premis la ŝultron kaj brakon, samtempe estis aplikataj la metodoj de knedado, premŝovado ktp. Kiam la studento tion ellernis, li praktikis ĝin sur la korpo de Ĝang Ĝeng, ĝis ĉi tiu sentis la masaĝadon esti korekte farita kun forteco ĝusta, kaj tiam la ellerninto komencis instrui la aliajn kunlernantojn laŭ la sama maniero. La lekcio finiĝis nur post kiam ĉiuj lernantoj praktikis lernitaĵon sur la korpo de sia instruisto.

La respondeculo de la kurso Ĝang Ĝongping diris al mi, ke masaĝoterapio dependas tute de la manipulado de la du manoj, kaj tial taŭgas por ĝi la blinduloj. Tamen, por esti sperta en tiu kuracarto, la blindulaj kuracistoj devas ankaŭ posedi, kiel la ordinara kuracistoj, la fundamentan teorion de anatomio, *ĝinlo*-o, diagnozado k.c., kaj la sciojn de klinika diagnozo. Kvankam la instruistoj de la kurso ellaboris serion da instru-metodoj per rekta percepto, konforme al la karaktero de la blinduloj, tamen la junuloj nevidipovaj, kiuj povas sin apogi nur sur sia memorado kaj palpado, devas laboradi kelkoble pli energie ol homoj ordinaraĵ por akiri tiujn ĉi sciojn.

Post labortempo, kune kun kuracisto Hong mi faris viziton al la domo de Ĝang Ĝeng. Lia loĝejo estis pura kaj komforta. Enirinte la ĉambron, tuj tiris mian atenton la vicoj da libroj sur la bretaro. Tie sin trovas la grandaj kaj dikaj libroj por blinduloj, kaj ankaŭ ordinaraĵ libroj politikaj kaj beletraĵ. Mi demandis al Ĝang Ĝeng kiel li lernis kaj legis la librojn. Mi ne supozis ke mia demando vekos emociigajn rememorojn ĉe li. Li diris ke la unuan fojon kiam li sin vestis en blanko kaj estis nomata kuracisto de la paciento, lia vizaĝo tuj varmiĝis kaj la

koro senĉese batis, ke li eĉ ne klare aŭdis kion rakontas la paciento pri sia malsano. Li pensis, ĉu li eble ne estas en sonĝo! Ĝang Ĝeng diris kun emocio, ke antaŭ la Liberiĝo atendis la blindulojn nur senlaboreco kaj mallumo. Nun, post la Liberiĝo, la Komunista Partio kaj la Popola Registaro malfermis vastan vojon antaŭ la blinduloj, kaj prizorgis ilin de ĉiuj flankoj en politiko, laboro kaj vivado. Ekzemple, speciala institucio establiĝis por eldoni librojn por blinduloj en brajlo. La prezo de la libroj estas malalta, malgraŭ la alta produkta kosto. Por faciligi al la blinduloj interesanĝon de spertoj eĉ la afranko por libroj senditaj de blinduloj estas multe pli malalta ol por neblinduloj.

La paroloj de Ĝang Ĝeng vigligis la atmosferon en la ĉambro. Lia edzino interdiris: "Tiujn ordinaraĵ librojn mi voĉlegas por ili. En libertagoj, ofte venas pacientoj kiuj voĉlegas ĵurnalojn aŭ novajn medicinaĵ librojn por la blindulaj kuracistoj." Inter ili ja regas intima amikeco. Foje, kiam unu butono sur la jako de iu kuracisto defalis, pacientino kiu venis por masaĝe kuraciĝi ŝtele ĝin ree alkudris por li. Aferoj, tiaj, kvankam bagatelaj, ĉiam kuraĝigas la blindulajn kuracistojn.

Riĉrikolto de Kokoso en Hiŝuangbanna.

Pentrita de Kiaŭ Ŝiguang



* Laŭ la ĉina tradicia medicino, en la homa korpo estas sistemo de *ĝinlo*-o sur kiu estas multaj *hju*-oj (punktoj, nodoj). Premo, piko aŭ ekscito al iu el la lastaj donas specifan influon al certa organo.

KURARARBO*

Ilustraĵo de Jang Junking

APUD la ondanta Lancang-rivero, en bluverda densejo de nan-bambuoj (*bambusa nana*), kaŝiĝas Mangja-vilaĝo kun kvadrata-tegmentaj bambudomoj, kie staras kurararbo verdfolia kaj flavflora, sur kies trunko enfiksiĝis miloj da plumvostaj sagoj. La kurbaj branĉoj donas al ĝi aspekton de militisto kun sagoj surdorse, kiu gardas sian vilaĝon. Kiam la maljunuloj de Taj-nacio, el- kaj en-irante la vilaĝon, preterpasis la arbon, ili nepre riverencas al ĝi kunmetante la manplatojn**.

Ĉiufoje en tago de ĉaso, la junuloj ekŝultroportas sian sagujon, pendigas sian sabron ĉe sia flanko, iras al la arbo, facile deprenas unu post alia la venenajn sagojn kun ruĝpluma vosto de sur la trunko, enmetas ilin en la sagujon, kaj iras en la vastan arbaron por ĉasado. Kiam la suno subiras, revenas la ĝojaj ĉasistoj portante la ĉasajon, kantante kaj ridante kaj tamtamas por sciigi la triumfon. Tiam la vilaĝanoj kutime alkuras sub la kurararbon por bonvenigi tiun grupon da "bravaj agloj". Post kiam la junaj ĉasistoj respektplene prezentis la kaptajojn al la aĝuloj de la vilaĝo, ilin portis en la vilaĝon kaj disdonis egale al ĉiu familio laŭ la antikva kutimo, ili unu post alia elprenis el sia sagujo la venenajn sagojn kiujn ili almetis unuope al la pafarko kaj pafis sur la arbotrunkon, ĉar ili ne volis alporti senatente en la vilaĝon la venenajn sagojn kiuj povus vundi homojn kaj bestojn.

Iun tagon kiam ni preteriris Mangja-vilaĝon, ni ĝustatempe renkontis la revenintajn ĉasistojn, kiuj estis pafantaj la sagojn al la arbo. Kaj laŭ nia peto, iu juna ĉasisto faris al ni la jenan kortuŝan rakonton.

Antaŭ oni ne scias kiom da jaroj, kiam Mangja ankoraŭ estis kovrata de pra-arbaro ĉielskrapanta, la vilaĝanoj loĝis sur ebena kelkdek li-ojn for. Malfeliĉe, inundo kvazaŭ muĝanta monstro englutis la vilaĝon kaj kampojn. En la vilaĝo estis ĉasisto nomata Bohongŝa (patro de fenikso). Li kondukis la popolanojn kun la bovoj kaj ĉevaloj sur la montdeklivon kaj fondis tie la vilaĝon. Ili elingigis siajn sabrojn, hakfaligis la densajn arbojn kiuj baris la sunlumon, konstruis naŭdek naŭ duetaĝajn bambudomojn kaj fumstrioj ekŝvebis super ili. Poste Bohongŝa kondukis la loĝantojn kun la bovoj kaj ĉevaloj malsupren de la monto, plugis kaj disemis grenojn.

Iun tagmezon, la bruliga suno karbigis la verdajn foliojn, ĉiuj maljungis la brutojn dis de la plugiloj, kaj kuŝiĝis sub la arboj por ĝui la malvarmeton en la ombro. Subite alblovis forta vento

el la arbaro, kun kiu elsaltis fluge sepdek sep furiozaj tigroj. Ili kuregis en la vilaĝon kaj mordmortigis sennombrajn homojn kaj dombrutojn. Bohongŝa gvidis junulojn ĉasadi la tigrojn kun eltiritaj sabroj kaj fortaj arbalestoj. Ili luktadis dum la tuta posttagmezo. Sango fluis ĉie en la vilaĝo. Sennombraj junuloj estis mortigitaj aŭ vunditaj de la tigroj kaj ankaŭ tie sin sternis sepdek mortintaj tigroj. Sed restis ankoraŭ sep furiozaj tigroj kiuj kuris tien kaj tien en la vilaĝo. Bohongŝa kaj aliaj savis la maljunulojn, virinojn, malfortulojn kaj infanojn, evakuis la vilaĝon kaj rifuĝis portempe en la montojn kie ili bruligis fajrojn ĉirkaŭ sia ripozejo.

Frumatene de la sekvanta tago, apenaŭ ekestis la taglumeto kiam Bohongŝa kolektis la restajn virojn ĉirkaŭ fajro, kaj interkonsiliĝis kun ili kiel mortigi la sep furiozajn tigrojn, kiuj ankoraŭ okupis la vilaĝon. Je la komenco oni mortigis bovon, kaj metis venenon en ties korpon por logi la tigrojn. La kruelaj bestoj tamen ne manĝis la mortintan bovon kun veneno, sed sin ĵetis al la homamaso. Eltirinte siajn sabrojn, ili ekĉasis la tigrojn furioze. Finiĝis la tuttaga luktado kaj sango denove ruĝigis la teron. Bohongŝa elportis surdorse la vunditajn kaj mortigi-



tajn junulojn unu post alia, kaj fine li fortrenis ankaŭ kvar mortigitajn tigrojn. Maljunuloj kaj virinoj de la vilaĝo entombigis kun larmoj la junulojn, kunportis surdorse la vunditajn en la ombrojn de arboj, kaj kuracis iliajn vundojn per drogherboj. Tamen, en la vilaĝo ankoraŭ estis tri plej ferocaj tigroj kaj neniu kuraĝis reveni al vilaĝo. Je vido de la plorantaj maljunuloj la koro de Bohongŝa multe doloris al li kvazaŭ pikite per tranĉilo. Li do kolektis la junulinojn, diris al ili ke ili kunportu la sabrojn de siaj edzoj kaj kunprenu fortajn arbalestojn. Bohongŝa mem tenante sabron en unu mano kaj botelon da likva veneno en la alia, kondukis la virinojn en la vilaĝon. Furioza tigro alsaltis sur Bohongŝa-n kaj faligis lin. Li eltiris sian sabron kaj hakis ĉirkaŭe. La vosto de la tigro estis dehakita, kaj ĝi forprenis lian sabron per la buŝo. Bohongŝa tuj trinkis la venenan likvaĵon. La veneno tuj penetris en lian sangon kaj karnon, lia tuta korpo fariĝis kvazaŭ ruĝa fajroglobo. La tigro forlasis la sabron kaj ree sin ĵetis sur lin. Kiam la tigro mordis lian haŭton kaj karnon, ĝi estis tuj venenigita kaj mortis ĉe lia flanko. Li ekridegis, alvokis la virinojn kaj diris ke ili enpiku lian haŭton per sagoj tiel ke la sagopintoj trempigu en la venena sango kaj pafu per ili la aliajn du tigrojn. Kiam li vidis propraokule,

ke la ceteraj tigroj estis mortpafitaj, li rigardis ĉielen kaj haltis ridante ĉe la vilaĝorando.

Kiam oni venis al la vilaĝo por serĉi lin, ili trovis, ke lia kadavro firme staris tie kaj jam transformiĝis en arbegon. Milojn da jaroj depost tiam, la taj-oj mortpafas sovaĝajn tigrojn per sagoj ŝmiritaj per la venena fluaĵo de la arbo. Kiom ajn ferocaj estas la tigroj, trafite de tiaj sagoj, tamen ili ne povis plu fari pli ol tri paŝojn. Tial ĉi tiu maljuna arbo estas nomata "Guan-San-Ŝuj" (t.e. trafite de tia sago nepre mortos en tripaŝa momento). Havante tiun ĉi miraklan arbon el la korpo de Bohongŝa, la taj-oj jam ne timas la kruelajn tigrojn en la arbaro. Kiam ajn oni preteriras sub tiu ĉi antikva arbo, ĉiu respektplene esprimas al la heroo Bohongŝa dankojn kaj benojn per kunigo de la manplatoj. De la malproksima antikveco, generacion post generacio ili mortpafis sennombrajn kruelajn tigrojn, uzante la venenajn sagojn enpikitajn sur la kurararbo.

Fininte la rakonton, la juna ĉasisto levis sian kapon, rigardis al la alta antikva arbo, kaj benis ĝin, kun kunigitaj manplatoj kaj rido, kiel respektindan aĝulon kaj karulon.

* Kuraro — veneno el certaj tropiklandaj arboj, kiu povas paralizati la nervojn kaj kaŭzi morton.

** Salutgesto de budhistoj.

Pri la Ensemblo de Orientaj Kantoj kaj Dancoj

(Vd. p. 89, nro 2 EPĈ) Skizoj de Je Kianju



Solo.



Zabateo, tipa kamparana danco (kuba).



Melodio de Jagibuŝi (japana).



Ĝojo (korea).



Drinki el la Sama Rivero (pri la ĉina kaj birma amikeco).



Danco de Piedsonoriloj (pakistana).



Feinoj en la Ĝardeno de Floroj (kamboĝa).



Danco de Balono (hinda).



Hojega (etiopia).

La Artajoj

de Jad-birdisto Ĝang



por li la plej bona lernejo. “Mia plej granda ŝato en dimanĉo estas viziti la zoologian ĝardenon”, diris al mi la maljuna artisto kun plenaj rido kaj humuro, kiam nia paroltemo turniĝis de la tekniko ajurĉizi la birdungojn al la profundeniĝo en la vivo kaj observo de vivaj birdoj. “Rigardo al vivaj birdoj neniam min tedas. Kvan-kam la tutan vivon mi okupiĝas pri skulptado de jadbirdoj, mi tamen ĉiam sentas ke mankoj estas en mia arto kaj mi devas ĝin pliperfektigi.”

Proverbo diras: “Jado ne prilaborita, ne fariĝos aj’ utila.” Jado estas materialo ege malmola, oni eĉ ne povas ĝin prilabori per ordinara ĉizilo. Por tio oni devas uzi smirgon kaj torndiskon. Ĝang Junhe kreis per tiaj iloj, ege simplaj laŭ aspekto, multpozajn vivecajn birdojn, inter kiuj estas ekz-e birdo kiu ekripozas post flugo, birdoj tuj forflugontaj, aŭ birdoj kantantaj kun la kapo supren levita kaj birdidoj ĵus elŝeliĝintaj, kiuj malfermetis sian bekon, por la unua spiro. Ĉiuj ĉi tiuj birdoj havas la propran artstilon de Jad-birdisto Ĝang. En la kuranta jaro, imitante porcelanan pendvazon en kunligo de la karaktero de jadaj objektoj, Ĝang Junhe kreis alian novan artaĵon de sia skolo, nome, la papagopendvazon. Sur arbobranĉo staras papago kiu ĝin forte piedpremas kun la flugiloj disetenditaj kvazaŭ tuj forflugonta, kaj pli interese estas ke sur la branĉo tie kaj tie elkreskis burĝonoj verdetaj, kiujn li elĉizis laŭ la naturaj koloroj

SUR granda melono ripozas bluverda birdo kvazaŭ vivanta kun flava folio en sia beko: jen la nova verko de la maljuna metiartisto Ĝang Junhe kiu estas famkonata jam delonge en la metio de jadaj objektoj en Pekino sub la kromnomo “Jad-birdisto Ĝang”. Kiom da lerteco kaj saĝo oni bezonas por krei tiun ĉi artaĵon tiom vivecan kaj belkoloran el kruda jadopeco per prilaborado laŭ ties naturaj formo kaj koloroj!

El la prilaborejo ritma susuro de jadtorniloj fluadas en la kabineton. Majstro Ĝang Junhe prenis de sur la tablo la kontentigan artaĵon kiun li ĵus pretigis kun ĝojego en la koro. Fingre montrante la birdon smeraldan kaj flavkapan li diris al mi ke nur lerta adapto de la naturaj vejnoj, formo kaj koloroj de kruda jado ebligas krei artaĵon kun formo tiom perfekta plastike kaj koloroj ĝuste, laŭnature adaptitaj kio estas tre grava en projektado de jadartaĵoj.

Tiam mia akompanantino el la oficejo de la produktejestro, ridante diris ke birdoj skulptitaj de Majstro Ĝang distingiĝas per la “beko malfermita kaj ungoj ajuraj”. Parolante ŝi montris la birdon sur la tablo: “Rigardu, kiom forte teniĝas sur la melono la ungoj de la birdo! Vere ĝi similas al viva birdo!” Bone rigardinte la artkreaĵojn de Jad-birdisto Ĝang, mi trovis ke ŝiaj vortoj estas veraj. Ĉiuj liaj jadbirdoj havas ungojn kun natursimilaj kaj reliefaj artikoj, iliaj ungpintoj forte direktiĝas malsupren, la beko estas malfermita, eĉ kun la lango kaj palato videblaj. Tio faris la birdojn tre versimilaj kaj vivecaj.

La inĝenian prezenton de la vivaj figuroj de birdoj de la kapo ĝis la ungoj, Ĝang Junhe atingis ja per diligenta praktikado dum dekoj da jaroj. Li kreis artaĵon neniam “en fermita kabineto” nek nur imite al la antaŭuloj, sed li emas observi la naturaĵojn. La Pekina Zoologia Ĝardeno estas

de la kruda materialo. La burĝonoj ne nur ornamas la verkon sed ankaŭ aldonis al ĝi pli da freŝeco kaj viveco. Per tiu ĉi papagopendvazo li rompis la rutinon en projekto de jadaroj kaj kreis tute novan specon de jadartaroj.

En la malnova socio, Ĝang Junhe, havanta tian eminentan arton, ĝin instruis al neniuj pro timo ke "kiam la arton ellernos l' instruato, mortos la majstro en

malsato". Sed nun, kiel multaj aliaj veteranaj metiartistoj ankaŭ Ĝang Junhe publikigis sian tutan teknikan sperton akumulitan dum multjaraj studpenadoj kaj li persone instruas al sep lernantoj en produktado. Post nur unu-du jaroj da lernado, iuj el ili jam atingis rimarkindajn sukcesojn en faro de jadartaroj. Eksperto laŭdis ekvidinte iliajn verkojn: "Jam montriĝas en ili la spirito de

Jad-birdisto Ĝang!" Kvankam la lernantoj progresas rapide, tamen Ĝang Junhe ankoraŭ ne kontentas. En lasta dimanĉo li faris viziton al la Pekina Zoologia Ĝardeno kune kun la lernantoj por observi tie vivajn birdojn, celante pliriĉigi la temojn en artkreado. Li diris: "Nur se la lernantoj rapide superos sian majstron, tiam efektiviĝos mia deziro".

Li Jing:

Sur la Paŝtejo

— Poemoj verkitaj sur Tekes-stepo —

Mateniĝo Sur la Paŝtejo

Sur la paŝtejon falis jam la steloj,
fariĝis ili mil mil brilaj roso-perloj;
la stepon survualas ruliĝante akvvaporo,
aromas la nebulotulo per florbondoro.

Plaŭd-plaŭd-plaŭd! — sur tendon flugas jen
majesta koko.

Ĝi staras brave kvazaŭ sur montkresta roko.
Fiere rigardante la vastajon, ĝi ekfaris
krion —
elvokis la aŭror-radiojn kaj kuir-fumstrion.

Revenas la paŝtisto de noktgardo,
leviĝas la ĉashundo satdorminte;
geknaboj jam forrajdis por lernado —
Jen sonoras lern-signalo tinte. . . .

Patrio mia prosperanta, jen mi vin revidas
ĉi tie, kie tiom bele ĉio ĉarme ridas;
Kaj vidu: venas melkistin' en bluzo blanka,
akceptu florbukedojn, freŝan lakton en
siteloj ankaŭ.

Nokto

Mutiĝis ĉevalhufaj gamoj,
ekbruas verve jen motoro.
Bovidoj, ĉevalidoj, ŝaf-infanoj,
ne batu kaj ne timu via koro.


"Mama! mama!
Alvenas projekcia trupo!"
De feltodomoj malfermiĝis ĉiuj pordoj
kvazaŭ sovaĝaj krizantemoj je ĉi tiuj
vortoj.

"Geknaboj, novajn botojn ŝanĝe portu,
jam pretas laktoteo, tason trinku!"
Sed ili jam galope kuris for tuj.
Per kia vort' nun ilin flugatingu!

"He, avo Abdu, iru, filmon vidu
submonte. Mi noktpaŝtos anstataŭe. Jam
rapidu!"
aldiras la grupestro en krepusk' vespera.
Surherbe ekbriletas par' da larmoj per laj.
Noktiĝo — sur la step' etendas sin ekran'
arĝenta;
noktprofundiĝo — bildserioj, kant' kres-
ĉenda.

"Ho, Prezidanto Maŭ, Vi patro ĉiunacia!"
— en sonĝo jen elkora vort' pasia.

Trad. Laŭlum



granda familio de amikeco! Kiel feliĉe estas lerni ĉi tie!”

Solidaraj kiel Fratinoj

“Granda familio” — estas impresio ne nur persona de la delegito el Hingiang, sed ankaŭ komuna al ĉiuj vizitantoj al la Centra Instituto por Nacioj. Mi faris viziton al la ĉambro de “ses franjoj”. Ĝi estas dormoĉambro de la literatura fakultato kaj loĝata de ses knabinoj el kvin nacioj. Kiam mi eniris la ĉambron, tie troviĝis nur kvin el ili. Ili ridante diris al mi: “La plej aĝa franjo Sun ankoraŭ ne revenis.” “Franjo Sun” estas knabino de Han-nacio propre

nomata Sun Daŭĝu kaj kiam mi vidis ŝin poste, mi eksciis ke ankaŭ ŝi estas nur ĉirkaŭ dudek-jara, malgrandstatura, kun du harplektaĵoj, tamen ĝuste ŝin ili ĉiuj rigardis kun intimeco kiel la plej aĝa franjo. Ĉi tiu nomo devenas jene: En la ĉambro, se iu malsaniĝis aŭ ies vesto ŝiriĝis, ŝi tuj donis sian fervoran helpon. Foje difektiĝis la ĉemizo de Mo Ŝunkjun el Buĵi-nacio, kiu ne sciis kiel fliki ĝin, ŝi helpe elpensis rimedon ĝin transformi en alimodan veston. Aliffoje fraŭlino Fang Junĉing el Taj-nacio suferis de piedvundiĝo en prezentado de “pavo-danco”, la aliaj en la ĉambro alportis varman akvon por trempado de ŝia piedo kaj ŝin konsoladis. Kaj poste ili ankaŭ helpis ŝin lerni libertempe la lecionojn kiujn ŝi ne lernis pro malsaniĝo. Ili tiel solidare prizorgadas unu alian kiel veraj fratinoj.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

Scienca Aktivado en Kantono

En februaro de la kuranta jaro pli ol mil filozofoj, ekonomiistoj, historiistoj, arkeologoj kaj filologoj partoprenis la aktivadojn de la komuna jarkunveno okazigita de la Filozofio-scienca Asocio de Guangdong-provinco en la daŭro de 21 tagoj. En la kunveno estis prezentitaj pli ol 170 disertatoj pri diversaj sciencaj branĉoj. El la studataj kaj diskutataj problemoj, multaj koncernas ordigon kaj pristudon de niaj riĉaj historiaj kaj kulturaj heredaĵoj, aliaj estas teoriaj kaj praktikaj demandoj intime ligitaj kun la aktuala ekonomia kaj kultura konstruado de la lando, kaj ankaŭ estas tiuj pri la periododivido de la monda historio kaj pri la anglaj modernaj romanoj.

Libroj en Diversaj Lingvoj Eldonitaj en Hingiang

En la lastaj dek jaroj la Hingiang-a Popola Eldonejo eldonis diversajn librojn kun pli ol 2500 titoloj kaj eldonnombro de ĉ. 36,000,000 ekzempleroj. Inter ili, krom tiuj en la hana lingvo, estas eldonaĵoj en la uĝura, kazaha, mongola, siboa kaj ĥalĥazaa lingvoj, kiuj jam okupis pli ol 80% de la tuto en titoloj kaj 57.9% en ekzempleroj. Ankaŭ la Pedagogia

Eldonejo kaj Junulara Eldonejo de Hingiang grandkvante eldonis librojn en la diritaj lingvoj. La nacimalplimulto en Hingiang, kiuj estis senrajtigitaj uzi sian nacilingvon antaŭ la Liberiĝo, jam povas legi librojn en la lingvo de sia propra nacio.

Kreskigo de “Vivanta Fosilio” Sukcesis

Metasekvo (*metasequoia glyptostroboides*, Hu et Cheng), kiun la botanikistoj nomas “vivanta fosilio”, estas altkreska arbo kun pinglaj folioj. Ĝia delikata kaj kompakta ligno taŭgas por domkonstruo kaj paperfarado. Krome, ĝi estas ankaŭ arbo kun densaj branĉoj kaj folioj, rekta kaj svelta trunko, taŭga por beligi la pejzaĝon. En la pasinteco, oni trovis nur ĝian fosilion el la geologia tavolo. Ĉar metasekvo origine kreskis en Norda Poluso dum la malsupra kretaceo antaŭ pli ol cent milionoj da jaroj. Kaj poste

ĝi disvastiĝis en Eŭropo, Azio kaj Norda Ameriko. Post la Tria Epoko pro apero de glaciriveroj, metasekvo pereigis en ĉiuj kontinentoj escepte en malgranda regiono en centra Ĉinio. En 1945 ĉinaj botanikistoj trovis tiun raran arbon en la arbaro ĉe la limo de Siĉuan- kaj Hubej-provincoj. Post studo de la ĉina fama botanikisto prof. Hu Hiansu kun arbologo prof. Ĝeng (Cheng) Ŝikjun, estis konfirmite ke ĝi estas tiu metasekvo de antaŭ cent milionoj da jaroj kiun oni opiniis malaperinta jam delonge. Pro tio ĝi portas la nomon de “vivanta fosilio”. Nun en pli ol 50 landojn de la mondo, la arbidoj de metasekvo estas transplantitaj el Ĉinio. La Siĉuan-provinca Instituto pri Arbarokulturo provis kreskigi metasekvan arbaron sur vasta tereno en la monta regiono 1300 metrojn alta super la marnivelo en okcidenta Siĉuan kaj la plantita arbaro estas nun jam bone vivanta.



Pri la Drakboata Konkurso

LA okazado de drakboata konkurso je Duanvu-festo, nomata ankaŭ Drakboata Festo, estas longtradicia kutimo de la ĉina popolo. Oni diras ke ĝi estiĝis memore al nia antikva granda poeto Kju Juan (343-290 a.K.). En literaturoj el la sesa kaj sepa jarcentoj, estis jam registrita tiu ĉi kutimo. Sur monto ĉe la norda bordo de Miluo-rivero en Hunan-provinco sin trovas Ĝaŭkju-pavilono (pavilono por revenigi la animon de Kju Juan), kiu estis la fincelo de la tiea drakboata konkurso en tiu tempo. En someraj vesperoj sub la brilanta luno kaj en facila vento, ŝvebis sur la vasta kamparo la melan-kolia popolokanto, en kiu la popolo montris sian sopiron kaj funebnon al la poeto kaj malamon al la reĝo Huajvang.

*La luno brilas sur Ping-rivero,
Dronigu Huajvang la fluoŝvelo.
Brilas la luno kaj larm' amara,
La reĝo dronu, sed ne l' lojala.
Lojala Kju Juan ricevu kulton.
La nobla vivu! Al Huajvang morton!*

Sed, poste, la drakboata konkurso fariĝis iom post iom unu el la gajaj festaktivadoj. La boatkonkurso kanto verkita de Ĝang Gianfeng el Tang-dinastio (618-907 p.K.) vive priskribis la spektaklon:

*Je la tria tamburbat' ekflirtas ruĝaj flagoj,
Sur la akv' alnaĝas salte du gigantaj drakoj.
Sin svingadas la remiloj kvazaŭ dekmil glavoj.
Tondras la tamburrulado tranĉante la akvon.
Pli kaj pli ĝi intensiĝas ĉe alproksimiĝo
Al la cel'. Jen, kvazaŭ rulas sin la drakokuloj.
Sur la bord' eksplodas tondre homamasaj krioj
Kvazaŭ ĉielark' surstange buntas silkaj strioj.*

Dum la konkursado, la rigardantoj ĉiuj en festaj vestoj svarmas sur la bordo de Miluo-rivero, kaj la junulinoj kantas sonore amkanton:

*En la festo de la kvina de l' kvina monato,
Surakviĝas en rivero la draka boato.
Vice sidas la remistoj en ambaŭaj flankoj,
Meze ĉe l' tamburo estas ja mia amato*

.....

Inter la guangdong-provincaj muzikajoj estas peco titolita *Konkursado de Drakaj Boatoj*, kiu bele priskribas muzike la spektaklon. La kompare malrapida komenciĝo de la melodio prezentas la starton, kaj tiu disvolviĝas pograde ĉiam pli intense ĝis la kulmino responde al la fina konkuro por atingi unua la celon. La muzikaĵo estas karakterizata per impono kaj braveco kaj estas tre bela.

En la sudaj provincoj de Ĉinio kiaj Giangsu, Ĝegiang, Fugian, Hunan, Hubej, Siĉuan, Junnan, Guejĝoŭ, Guangdong, kaj la aŭtonoma regiono Guanghi, estas tre populara la kutimo de drakboata konkurso, kvankam la formoj kaj la longecoj de la drakboato, kaj la reguloj de la konkurso diferencias en diversaj lokoj. En la konkurso okazanta sur Miluo-rivero, la unua ceremonio estas la "lumigo". Portante kelkdek parojn da bruligitaj kandeloj, oni iras trifoje ĉirkaŭ la boato, por honorigi Lu Ban, la pramajstro



Drakboatoj en Kantono dum antaŭkonkursa momento.


Foto de Hinhua

de ŝipkonstruado, kaj due oni portas kun la kandeloj la kapojn de la drakoj al la templo de Kju Juan por fari oferriton tie, kaj fine la boatoj dekoraciitaj per ruĝaĵoj surakviĝas. Je la ektondro de eksplodsignalo, ĉiuj boatoj startas. Ĉiuj remistoj portas specialan uniformon kiel soldatoj. Por la venkintoj estas farata speciala ceremonio. La venkintaj remistoj levas alte sian remilon, kun tamburado de venko, la boato ĉirkaŭiras sur la akvo kun plena digno.

En Ming- kaj King-dinastioj (1368-1644 kaj 1644-1911 respektive), el la drakboatoj uzataj ĉe la baseno de Jangzi-rivero, la plej grandaj estis proksimume cent dekkvin futojn longaj, kun po okdek remiloj; la plej malgrandaj estis ne malpli longaj ol sepdek kvin futojn, kun po pli ol kvardek remiloj; kaj la mezgrandaj estis naŭdek kvin futojn longaj, kun po sesdek ĝis sepdek remiloj. Ĉar en tiu tempo ne estis horloĝo, oni kalkulis la rapidecon per tamburbatoj. La plej rapida transiro de Jangzi-rivero okupis la tempon de tricent sesdek tamburbatoj.

La guangdong-anoj havas krom drakboatan konkurson ankaŭ drakboatan remadon, kiu lasta estas nur por elmontri. La drakboato ankaŭ longas ĝis cent futoj, kun sepdek ĝis okdek remistoj. Dum la konkurado, oni batas tamburojn kaj gongojn kaj sonigas fajrokrakilojn, la bruado skuas la vastan kamparon, kaj la drakboatoj vete kuras antaŭen sulkigante la ondon. Ĉio formas kune belan kaj grandiozan spektaklon. En Fanju-gubernio, Guangdong-provinco, estas konservata eksterordinare eleganta drakboato pli ol cent kelkdek futojn longa kaj ok futojn larĝa, kiu laŭdire estas el Song-dinastio (960-1127). Sur la boato estas eĉ podio por fari diversajn prezentojn. En Ming-dinastio, al la drakboatoj ĉe la piedo de la monto Ginsan en Ĝengiang estis vivece alskulptitaj elstaraj okuloj kaj etenditaj ungoj. Vicoj da glavoj kaj lancoj starigitaj post la drakkapo, kaj la remiloj ĉe ambaŭ flankoj de la boato kun longaj teniloj donis al ili aspekton imponegan. Sur la boato estis alfarita tegmento el koloraj tukoj, antaŭ kaj post kiu staris broditaj ombreloj. Ĉe la drakkapo inverse staris homo sur siaj manoj, kaj sur la drakvosto pendas infano, tiklante per sia danĝera teniĝo.

La drakboatoj en la ĉirkaŭaĵo de Luĝoŭ, Siĉuan-provinco, estas dekoraciataj blue kaj flave. Sur la drakboato, krom remistoj, estas ankaŭ direktisto kaj tambura bando. La direktisto kun signal-flago en la mano direktas la ho-ruk-kantadon sur la pruo. En la suda parto de Fugian-provinco la drakboatoj havas alte levitajn pruan kaj poŭpon. Ĉe la pruo estas skulptita granda drakkapo, ornamita per ruĝa silko, kun paro da brilaj okuloj, brovoj kaj barbo. La buŝego povas fermi kaj malfermi, kaj la lango povas moviĝi.



Ilustraĵo de Hju Kihjong


En Ĝangĝoŭ kaj Hiamen, Fugian-provinco, estas kutimo ke granda ligna boato ankras ĉe la fincelo de la konkurso kiel signalboato, kun anaso kiel signalo. Kiam la drakboatoj atingas la finon, la anaso estas jetata en la akvon el la signalboato, kaj la konkurantoj saltas en la akvon por ĝin kapti, kaj samtempe la rigardantoj kriegas por kuraĝigo.

En Guanghi, la drakboataj teamoj konsistas aŭ el viroj aŭ el virinoj, kaj oni remas aŭ per manoj aŭ per piedoj. La Mjaŭ-nacio ĉe Kingsuj-rivero en Guejĝoŭ-provinco havas drakboatan konkurson ĉiujare, okazantan je la dudek kvina de la kvina monato laŭ la luna kalendaro. Antaŭ la festo, la junulinoj brodas vestojn kaj jupojn, kaj poluras diversajn arĝentajn ornamajojn, dum la junuloj urĝkonstruas kaj kolorigas drakboatojn. La drakboato estas formita el tri pirogoj interligitaj. Ĉe la mezo estas la patrinpirogo longa pli ol sesdek futojn, kaj ĉe ambaŭ finoj estas du filpirogoj longaj pli ol kvindek futojn. Dum la konkurado, oni tamburas kaj tamtamas, kaj gejunuloj dancas kaj kantas sur la bordo, sin amuzante tra la tuta nokto ĝis la tagiĝo.

Post la Liberiĝo aldoniĝis al la festo en multaj lokoj apud la drakboata konkurso ankaŭ diversaj surakvaj sportoj. Ekzemple en Ŝantoŭ, Guangdong-provinco, okazas konkursoj de naĝo, plonĝo, akvopilko, motorboato, sanbano*, manflaga komunikado, surakva ŝnurtrenado ktp. La mjaŭoj ĉe Kingsuj-rivero en Guejĝoŭ-provinco ankaŭ aranĝas ŝnurtrenan konkurson, ĉevalan vetkuradon kaj pilkajn maĉojn. Kaj la remistoj de la siĉuan-aj drakboatoj ho-ruk-kantas:

*En antaŭensalto de patri-konstruo
Laboristoj, kamparanoj marŝu en v' antaŭo!
Ĉiuj streĉu siajn fortojn unukore,
Ne atendu side venon de v' morgaŭo.*

* Boato movata per du remiloj, kiuj kruciĝas antaŭ la brusto de la boatisto.




Ĝang Ŝiongfej:

Praktike Aplikebla Finludado

EN la lasta etapo de ŝakludo ofte okazas ke la ĉefaj fortoj de ambaŭ flankoj jam plejparte eliminiĝis intersanĝe kaj la post-restantaj fortoj de unu flanko estas preskaŭ egalaj al tiuj de la alia, sed unu flanko havas tre malgrandan superecon al la alia kaj kompreneble tiu utiligos tiun etan superecon por pligrandigi ĝin kaj fine atingi absolutan superecon. En tia okazo, por unu estas perspektivo de venko aŭ egaligo sed ne tiu de malvenko, kaj por la alia estas perspektivo de egaligo aŭ malvenko, sed ne tiu de venko. Tamen, se la antaŭa manovras ne tiel lerte, tiam la partio gajnebla por li finiĝos per egaligo; kaj se tiel faras la lasta, tiam la partio finebla per egaligo perdiĝos al li. Tiaj finiĝoj ofte aperas en praktiko, sekve ili havas karakteron formulan. Fari el ili tipajn ekzemplojn por faciligi la pristudon kaj ekposedon de iliaj ŝlosilaj manovroj aŭ eĉ iliaj reguloj por poste ilin utiligi en praktikado estas afero de "praktike aplikebla finludado" aŭ "formula finludado".

Ekzemple, la partio montrata per la bildo 1 povas finiĝi per egaligo, sed se la ruĝa manovras malbone, ĝi eble perdos la partion. La decida punkto estas la direkto de reiro de la ruĝa Es, kio devas garantii al la Ma elirejon sur la vertikala linio.

(a) 1. P f5 — g5 Es ĝ5 — h6!
2. G a6 — a5 Ma h5 — h4.
3. P g5 — g4 Es h6 — ĝ5!
4. P g4 — g5 Es ĝ5 — h6. 5. G a5 — b5 Ma h4 — ĝ4 (egaligo)



(b) 1. P f5 — g5 Es ĝ5 — h4??
2. P g5 — g4! Ma h5 — ĝ5. 3. G a6 — b6! Ma ĝ5 — h5. 4. P g4 — ĝ4 Es h4 — ĝ5. 5. G b6 — b5 Ma h5 — h6. 6. P ĝ4 : ĝ5 (la ruĝa Ma ne povas moviĝi, venkas la nigra).


Se post 2. P g5 — g4 la ruĝa ne movas la Ma-n, sed 2. ... Es h4 — ĝ5, tiam 3. P g4 — ĝ4 Es ĝ5 — g6. 4. G a6 — b6 Ma h5 — h6. 5. P ĝ4 — ĝ5! (la ruĝaj Ma kaj Es ne povas movi sin, venkas la nigra.)

La bildo 2 montras ekzemplon de sola Ĉa venkas super Es-j kaj Mi-j en kompleto. Partio de sola Ĉa kontraŭ kompleto da Es-j kaj Mi-j finiĝas per egaligo en certaj kazoj — ĉefe se la Es-j kaj Mi-j staras sur siaj normalaj pozicioj* kaj la du Mi-j povas protekti unu la alian. Sed en manovrado iuokaze Mi levis sin sur la flankon de la areo, aŭ la Ma forlasis sian kutiman sidejon en la mezo

de la funda linio, en tiaj nenormalaj situacioj, la flanko de Ĉa povas gajni iakaze la partion per ĝustatempaj trafaj movoj. En la okazo montrata per la bildo 2:

1. Ĉa a9 — e9!! Ma h4 — h5. 2. Ĉa e9 — e5! Ma h5 — h4. 3. G b5 — a5 Ma h4 — ĝ4. 4. Ĉa e5 — e4 + Es ĝ5 — g4. 5. G a5 — a4 Es h6 — ĝ5. 6. Ĉa e4 — e2 Es ĝ5 — g6. 7. Ĉa e2 — g2 Es g6 — ĝ5. 8. Ĉa g2 — ĝ2 + Ma ĝ4 — h4. 9. Ĉa ĝ2: ĝ5. Elimininte unu el la ruĝaj Es-j, la nigra povos facile elimini la alian solstarantan Es de la kontraŭa flanko; poste ĝi povos frakasi la du Mi-jn kaj venkos.

En tiu partio la decida punkto kuŝas en tio, ke: **unue la nigra Ĉa antaŭeniras por superregi la bordon de la limregiono ĉe la kontraŭa flanko, malebligante la ruĝan Mi-n levi sin al la pozicio e7 (markita en la bildo) kaj tio**



siavice retenas ankaŭ la Mi-n ĉe la fundo; plie la Ĉa rapidas plue okupi la mezan linion kaj tio retenas la du Mi-jn kiel antaŭe. Krome la nigra devigas la ruĝan Ma-n fari paŝon antaŭen (3. ... Ma h4—ĝ4), por havigi al si okazon peli la malamikan Es-n sur la supran angulon per ŝakigo kaj poste elimini la Es-n sur la palacentro. Tiutempe ne estas eble ke 3. ... Ma h4—h5, ĉar tiuokaze la nigra G povus moviĝi al la linio 4, kaj la ruĝaj Ma kaj Es ne povus sin movi, tiel ke restus al la ruĝa flanko nur la sola eblo de movo per ofero de sia Mi. Do la rezulto estus sama: rompo de kompleto da Es-j kaj Mi-j kaj sekve perdiĝo de la partio.

* T.e. en la pozicioj, kiujn ili okupas respektive antaŭ la komenciĝo de ludado, aŭ en ĝ5(Es) kaj ĝ5(Mi), de kie Es-j aŭ Mi-j povas protekti sin unu la alian.



Lotusfloro.

Ĉinstila pentraĵo de Hong Ji

Ĉen Guoping:

Mateno en Universitata Urbo

IOM post iom paliĝas la nuanca silueto de montoj simila al ĉin-inka pentraĵo, kaj sur la fono de rozkolora firmamento sin montras la ruĝa domo universitata kaj la flirtanta flago sur ĝi.

Kontraŭ la horizonton ruĝigitan de la aŭroro etendiĝas orflava trumpeto laŭte eksonoranta, kaj ĝia ruĝa silka pendaĵo forlevis la lastan tavolon de tulosimila nebulo. Vivplene vekigis la universitato, kiel ruĝvanga junulo.

En la brila sunlumo kaj freŝa zefiro aperas la siluetoj de la unuaj sinekzercantoj de kurado sur la sportejoj.

Tie, en la arbaro sur la rivereta bordo estas tute alia mondo. Profunde en la verdejo malklare vidiĝas homfiguroj en blanka ĉemizo. Estas tute senbrue, verdege kaj blublue; nur la rivereto, en akompano de fremdlingva laŭtleĝo, murmuradas. Maljunaj profesoroj sin ekzercas en *tajĝiĉjuan* tiel elegante, ke orioletoj kaj alcioletoj sur arboj ilin gapadas absorbite.

La sekretario de la Kompartia Komitato kun fremdlingva lernolibro en la mano trairas malaltan ulm-heĝon kaj irante li legas. Jen li haltas ĉe la benko sub poplo, kie la rektoro de la universitato kaj profesoro blankhara, tenante volumon de *La Plena Kolekto de Poemoj el Tang-dinastio*, ion legas. "Ha, vi studas poemojn tang-dinastiajn!" "Ho, vi lernas fremdan lingvon!" Kaj la tri paroj da okuloj koncentriĝas sur unu verson de la poemaro, sur kiu saltetas sunlumaj floroj sursutitaj tra inter branĉoj.

"Tintin, tintin..." aŭdiĝis la sonorado por matena memlerno. La matena sunlumo kaj verdeja floraromo denove invadas svarme la lernoĉambrojn. Silentas ĉio, nur la rebriloj de lagondoj petoleme saltas sur la vitrofenestroj kaj vento kantas en la arbareto.

Jen, ree hejtiĝas la altfornego de la fabriko por praktikado. Purpura fumo ŝvebas kaj ruĝaj nuboj facile flosas, la orruĝa sundiskego elpuŝiĝas el la matenaj ruĝaj nuboj.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

Arakidsemoj el la Tempo de la Primitiva Socio

La Gianghi-provinca Arkeologa Grupo trovis 4 semojn de arakido inter restaĵoj de du domoj el la fina periodo de la primitiva socio. La plej granda grajno longas 11 mm. kaj la plej malgranda 9 mm., kaj ĉiuj estas jam karboniĝintaj. En la pasinteco, la opinioj pri la deveno de arakido estis diversaj. Laŭ la ĝenerala opinio, ĝi devenis de Sudameriko kaj portiĝis en Ĉinion post la tria jarcento a. K., iuj tamen kredis ke ĝi estis enportita pli malfrue en la 17-a jarcento p. K. La trovita arakidsemo liveras novan materialon por studo de tiu ĉi problemo.

Budhista Kunveno por Granda Preĝado en Tibeto

La Budhista kunveno por Granda Preĝado estas la tradicia religia aktivado de la tibetaj budhistoj. Ĝi okazas ĉiujare kun celo preĝi por paco kaj prospero de la lando en la nova jaro. Nunjare la soleno komenciĝis de la 11-a de feb. en Lhasa. Multaj vivaj budhoj kaj *altrangaj lamaaj oficistoj* de famaj temploj ĝin partoprenis kaj la estro de la Tibeta Filio de la Ĉina Budhisma Asocio Gdanthripa Thubtankunga faris sutroeksplikadon al la partoprenantaj lamaoj.

Rakontoj pri Afanti

Ilustraĵoj de Huang Gongjun



Ĝi Diris ke . . .

Afanti ĉiam fanfaronis: “Mi povscias la lingvon de la birdoj.” Aŭdinte la famon la imperiestro portis kun si Afanti por kune ĉasi.

Ili marŝis kaj marŝis survoje, kaj subite aŭdiĝis ululo de strigo antaŭ aperturo de kaverno, kiu estis tre kaduka kaj ruinaspekta. La imperiestro demandis al Afanti: “Kion la strigo diris?”

Afanti respondis fingre montante la nazon de la imperiestro:

“Ĝi diris: ‘Se tiel daŭros senŝanĝe la regado kaj subpremado de la imperiestro al la popolo, post nelonge lia lando fariĝos tiel same ruina, kiel mia nesto.’”

Kuracado

Iu iris al la hejmo de Afanti, kaj petis lian helpon:

“Afanti, mia abdomeno ne estas en ordo, bonvolu kuraci ĝin por mi!”

“Ĉu vi manĝis ian malpuraĵon?” Afanti demandis.

“Nenian, nenian!” tiu respondis. “Mi manĝis nur pecon da bakita kuko karboniĝinta.”

“Oho! nu!” Afanti ne plu demandis detale. Malferminte sian medikamentan keston, li elprenis el ĝi iom da medikamento por okulo kaj diris:

“Nu, levu vian kapon, kaj malfermu viajn okulojn, por ke mi engutigu la medikamenton en viajn okulojn.”

“Ne misfaru, ne faru eraron!” surprizite, diris la homo. “Vi estas fama kuracisto, Afanti, doloras al mi mia ventro, sed ne la okuloj. Kion helpos via medikamento por okuloj?”

“Estu trankvila, estas nenia eraro!” Afanti diris serioze. “Oni devas esti konscienca en kuracado kaj preskribi trafe kontraŭ la malsano. Mi kredas, ke, se viaj okuloj ne malsanus, certe vi ne manĝos la karboniĝintan kukon.”

Serĉado de Saĝeco

La reĝo informiĝis pri tio, ke inter liaj popolanoj estas iu Afanti, kiu estas saĝa kaj erudicia. Do, li vizitis Afanti iun tagon kun siaj ministroj.

“Afanti, de kie vi akiris la saĝecon kaj multajn sciojn kiuj abundas en via cerbo?” la reĝo demandis.

“Ilin mi kolektis dank’ al senlaca serĉado.”

“Ĉu saĝeco povas esti trovata per serĉado?”

“Jes, Via Reĝa Moŝto!”

“Diru al mi, kie vi trovis ĝin.”

“He, tre facile, Via Reĝa Moŝto, prenu hakfosilon, kaj iru kun mi,” diris Afanti.

Tio ja tre multe ĝojigis la reĝon, kiu pensis en si: “De kiam mi surtroniĝis, la popolo opinias ke mi estas stulta kaj senkapabla, kaj konsideras min reĝo malprudenta. Estas vere, ke ne tre abundas al mi saĝeco. Ĉi-foje kiam mi trovas saĝecon, mi plenigos per ĝi mian cerbon, kaj reportos du kestojn da ĝi al mia palaco, por ke mia filo povu ĝin uzi post elkresko.”

Li do tuj sendis siajn ministrojn por alporti hakfosilon el la palaco, kaj iris kun Afanti por serĉi saĝecon. Kondukante la reĝon, Afanti iris kaj iris ĝis ili venis al virga terpeco. Tiam li demetis sian palton kaj diris, rigardante al la reĝo:

“Mia estimata reĝo, bonvolu demeti vian robon kaj ekmanipuli la hakfosilon.”

La reĝo ne trovis saĝecon post la unua, la dua kaj ankaŭ la tria fosoj. Al liaj manoj jam aperis sangaj vezikoj, kaj li tiel koleriĝis, ke lia barbo hirtiĝis kvazaŭ taŭzitaĵ herboj, kaj liaj okuloj rondiĝis kvazaŭ aperturoj de tasoj.

“Kial ne troviĝas saĝeco, Afanti?” li demandis.

“Ne estu malpacienca, Via Reĝa Moŝto. Fosu kaj fosu! Kulturu la terpecon dum tiu ĉi aŭtuno, semu saĝecon en la venonta printempo, kaj ni jam rikoltos en la sekvonta somero.” Afanti respondis tute senĝene, kaj levis alten denove sian hakfosilon.

“Ĉu per saĝeco vi fakte volas diri grenon?” demandis la reĝo.

“Vere, vere,” respondis Afanti, “sen greno en via palaco, kiun la popolo akiris per penado kaj ŝvito, kiel Via Reĝa Moŝto trovos necese hodiaŭ veni kun mi por serĉi saĝecon?”

Ankaŭ Vi Diris Prave

Iun tagon, iu alvenis kolere al Afanti kaj akuzis la homon, kiun li malamis. Aŭskultinte lian akuzadon, Afanti kapjesis senĉese kaj diris: "Jes, jes, vi estas prava!" kaj poste li forsendis lin.

La sekvintan tagon, ankaŭ la akuzito venis al Afanti, kaj kontraŭakuzis la akuzinton. Aŭskultinte lin, Afanti same kapjesis kaj diris: "Jes, jes, vi estas prava!" kaj tiel li ankaŭ tiun forsendis.

La edzino de Afanti, kiu aŭdis ĉion kion la du homoj diris al Afanti, ekmokis lin dirante:

"He! kia viro vi estas! Al tiu, kiu hieraŭ alvenis, vi diris: 'Vi estas prava', kaj al tiu, kiu venis hodiaŭ, vi same diris: 'Vi estas prava', nenian distingon vi faras inter pravo kaj malpravo; nenian diferencon vi vidas inter korekteco kaj eraro. Kiel senkonsciencia vi montris vin al la aliaj!" Aŭskultinte tion kaj meditante momenton, Afanti kapjesis: "Jes, jes, jes! mia edzinjo, ankaŭ vi diris prave!"



KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

La Ĉina Popolo Amas Literatura- turojn de Aziaj kaj Afrikaj Landoj

Literaturoj de aziaj kaj afrikaj landoj ĝuas grandan popularecon en Ĉinio. Laŭ statistiko, ekde la Liberiĝo en 1949, eldoniĝis jam pli ol 380 literaturaj verkoj de pli ol 30 landoj de Azio kaj Afriko. Japana literaturo jam tre frue estis konatigata al ĉinaj legantoj, sed transplanti ĝin pli sisteme, kompili kaj presigi apartajn ko-

lektojn de diversaj verkistoj estas farate nur post la Liberiĝo. La elektitaj verkoj de la famaj japanaj verkistoj, kiaj Nacume Soseki, Futabatej Ŝimej, Iŝikava Takubuku, Kobajaŝi Takiĝi, Mijamoto Juriko, Tokunaga Sunao k.a., estas jam eldonitaj. R. Tagore estas la unua el la hindaj verkistoj kies verkojn oni konatigis al Ĉinio. Lastjare aperis liaj elektitaj verkoj en dek volumoj. La verkoj kun temo kontraŭ-koloniisma de la indoneziaj verkistoj Abdoel Moeis kaj Utuy Tatang Sontani k. c. estas tre ŝatataj de ĉinoj. La plej amataj verkistoj el Koreio estas Han Ser Ya, Li Gi Eun; el Vjetnamio, Prezidanto Ho Chi Minh, To Huu, Nguyen Du k. a. La verkoj de mongola verkisto D. Nachugdorgi, de pakistana verkisto Ahmad Nagim Kasmi, de birma verkisto U Htin Fatt, de cejlona verkisto Martin Wickramasinghe

k. a. ankaŭ estas bone akceptataj de la ĉina legantaro.

La araba literaturo estis enkondukita en Ĉinion jam en la 13-a jarcento. Post la Liberiĝo, oni eldonis jam la 1-an ĝis 3-an volumojn de la verko "Mil kaj Unu Noktoj". Ĝia 4-a vol. aperos baldaŭ. Ĉetere, oni ankaŭ aperigis multe da famaj verkoj el arabaj landoj.

La literaturaj verkoj de landoj de Afriko, nome, *Granda Domo*, kaj *Incendio* de la alĝeria verkisto Mohammed Dib, *Afriko*, *Mi Ne Komprenas Vin* de kameruna verkisto Benjamin Matip, *Maljuna Negro kaj Medalo* de Fedinand Oyono, *Patrio*, *Mia Amata Popolo* de senegala verkisto Sembene Ousmane, *Ministoj* kaj *Ekhurlo* de sudafrika verkisto Peter Abrahams k. a. ĉiuj estas vaste ŝatataj de la ĉina leganta publiko.



"Belaj Floroj"

— Nova Filmo pri la Vivo de Infanoj —

OKAZE de la Infana Tago, la unua de junio k. j., kinejoj de Pekino montros alian novan filmon porinfanan *Belaj Floroj*. La filmo estas ideologie sana, lirika kaj plena de amuzoj kaj instruoj. Ĝi reprezentas al ni la vivon de nunaj ĉinaj infanoj tute alian ol tiu en la pasinteco.

La filmo ne nur ĉarmas per belega prezentado de kantoj kaj dancoj fare de "infan-artistoj", sed ankaŭ interesas per jena rakonto:

Por celebri sian festotagon, la infanoj organizis ĝojan renkonton kun diversaj programeroj, tre allogaj. Matene de tiu tago, Fang Hiaŭhua, la korifeo de la kantato, viciĝinta la unua ero en la pro-



gramo, iris al iu antaŭurba popolkomunumo por inviti la maljunan modelbrediston al la kunveno. Survoje, ili venis al malfeliĉa ĉevalĉaro falinta sur fervojo, kien baldaŭ devas trapasi vagonaro. Jen situacio morte danĝera! Hiaŭhua, spite ĉiun malhelpon, rapidis renkonte al la alkuranta vagonaro per rekta vojeto, ĝin haltigis kaj, tiel ilin savis. La akcidento tamen malebligis al nia malgranda korifeo reveni ĝustatempe por roli en la kantato. Kaj tio malordigis jam la tutan programon, antaŭe fiksitan kaj jetis la malgrandan kulisestron en embarason. Li ne sciis kiel sin helpi. Ankaŭ la malgranda reĝisoro tiam ne povis rearanĝi la programon en novan ordon.

Dum irado de la prezentado, kiu rikoltis tiom da varmaj aplaŭdoj ĉe la spektatoroj, multaj ridindaĵoj okazis malantaŭ la scenejo inter la kulisestro kaj la reĝisoro.

Kun malvolvo de la intrigo, la filmo regalas la rigardantojn per sinsekvo da mirigaj prezentoj, kiaj agrabla solo de antikva klaviceno*, interesa opero *Tumulto en Drakopalaco*, eleganta *Danco de Kvar Cignetoj*, pensiga pupoludo *Pseŭdsaĝa Katido* kaj la ridiga sceno en *Hejmo de Pasaĝeroj* ludita de antaŭ-lernejaĝaj infanoj ktp.

Malgraŭ ke multaj ludantoj en la filmo estas tre junaj, ili jam montris sian talenton en prezentado. Ekzemple tiuj, kiuj rolis





por Simio Sun Vukong, por Drako-reĝidino en la pekina opero, la malgranda akrobatisto k. a. vere mirigas la spektantaron per sia artplena lerteco. Kaj tiu malgranda ludinto de klaviceno fariĝis tiel nervoza antaŭ aperiĝo sur la scenejo, ke li eliris kaj sidis sola dumlonge. Kiam venas lia vico por ludi, la gvidanto ridetis al li ĉe la kurteno. Ankaŭ li ridetis responde kaj nur tiam li trankviliĝis denove. Tion li ludis nature kaj precize, tute konforme al la psikologia procezo postulata. La balbuta "Eta Okulvitrulo", kondukite sur la scenejon por tie ludi "Ŝuanghuang"-n,**


eĉ ne sciis kion fari. Li nur maŝine agis laŭ dispono de la reĝisoro malantaŭ si. Ekvidinte ke Hiaŭhua revenis, la reĝisoro tuj donis skriban informon al sia kunludanto je oportuna gesto de li. La "Eta Okulvitrulo" forgesis pro ĝojo ke li estas sur la scenejo, kaj ne povis sin regi de rideksplodo kun ekkrio "Ah!" Ĉe tio ĉi la spektantoj respondis per varmaj manklakoj, opinante ke li bonege ludis sian parton. Nur tiam li kvazaŭ vikiĝis el sonĝo. Tiujn emociajn ŝanĝiĝojn li ludis tre versimile.

El tiu ĉi filmo oni povas vidi ankaŭ ke la produktinto strebis

ĝin sukcesigi ankaŭ en tekniko. Li zorge aranĝis eĉ ĉiujn detalojn. Ekzemple li tiel aranĝis ke unu infano dum rigardado al la fleksgimnastiko, sin helpis per du malsamkoloraj celofan-paperetoj kaj prezentante lian vidon tra ili oni vidigas kolorŝanĝon sur la scenejo, kio multe beligas la medion kaj ĝuigas ne nur la infanojn sed ankaŭ la plenaĝulojn.

* Muzikilo kun 12 aŭ 13 kordoj.

** Ludo de du personoj, el kiuj unu la buŝon movas kaj faras samtempe gestojn laŭ la paroloj de la alia kiu sin kaŝas post li.





Esperanto Marŝas

Noveloj de Lusin Baldaŭ en Esperanta Eldono

Eble multaj el niaj legantoj scias, ke Lusin, granda verkisto de Ĉinio, estas la fondinto de la moderna ĉina literaturo. Parto de liaj noveloj eldoniĝis en Esperanto en 1939 sub la titolo *Lusin: La Elektitaj Noveloj* kaj ankaŭ lia alia novelo *La Vera Historio de Ah Q* estis eldonita esperante en aparta broŝuro. Sed ili konsistigas nur parton de la noveloj de Lusin, kaj krome ambaŭ de longe elĉerpiĝis. Por ke niaj legantoj povu aprezi la majstraĵojn de la ĉina literaturo, tuj post eldoniĝo de la Ĉina Antologio (1949-1959) ĈEL ekpreparis eldonadon de la noveloj de Lusin. Nun la laboro estas preskaŭ preta.

Estas kolektitaj en la libro entute 29 noveloj, inkluzive ĉiujn novelojn en la du originalaj noveloj de Lusin *Kriroj* kaj *Vagado* kaj kvar belajn reverkitajn legendojn el la kolekto *La Legendoj Rerakontitaj*. Oni povas diri, ke ĝi estas preskaŭ plena kolekto de la noveloj de Lusin. Krome, aldoniĝos al la kolekto ankaŭ longa artikolo pri liaj noveloj kaj lia konciza biografio. Abundajn klarigojn ĝi enhavos por faciligi komprenon de la legantoj kaj krome ankaŭ riĉajn ilustraĵojn. La tuta traduko estas kontrolita de la ĉina esperanta poeto S. J. Zee kaj de kelkaj eksterlandaj famaj esperantistoj.

La libro estas nun en la fina aranĝo por kompostado. Oni esperas, ke ĝi eldoniĝos en la kuranta jaro kiel plia kontribuajo de ĈEL al la komuna esperanta literaturo.

Aktivado de Ĉongkingaj Esperantistoj

En Ĉongking, granda industria kaj kultura centro de sudokcidenta Ĉinio, Esperanto estas diligente studata kaj disvastigata de kamaradoj Li Ĵen, Ĝoŭ Ĝigian k. a. En lapasinta jaro, du Esperanto-kursoj estis fonditaj por geinstruistoj kaj gestudentoj de la 25-a Gimnazio de tiu urbo sub gvido de k-do Li Ĵen, estro de la lernejo. En tiu ĉi jaro, k-do Li intencas starigi en tiu gimnazio eksperimentan kurson de Esperanto por pruvi, ke Esperanto estas bonega ŝtuparo en instruado de fremdaj lingvoj. En la 50-a Postlabora Lernejo de navigaciaj laborantoj, Esperanto-studrondo fondiĝis sub gvido de k-do Ĝoŭ Ĝigian. Lia 5-jara filineto ankaŭ lernas paroli esperante kaj ofte salutas la oĉojn kaj onjojn en la internacia lingvo.

El Sovetunio

En Moskvo vigla agado de la Esperanta Sekcio ĉe Centra Kulturdomo de Medicinistoj

—Kun bona verviĝo komencis labori nova administracio de la Esperanto-Sekcio kaj laborplano kaj programo por la 1-a kvaronjaro de 1962 jam estas presita kaj disvastigita inter sekcionoj. La 3-an de jan. malnovaj s-anoj Semonova kaj Teterin vizitis la Sekcion kaj rakontis pri sukcesplena per- kaj por-esperanta laboro en Leningrado. La 14-an de tiu sama monato okazis raporto de k-dino L. Sujetova pri biologiaj eksperimentoj kaj rakonto de k-do S. Averkiev pri persona konatiĝo kun J. Baghy en urbo Nikolsk-Ussurijsk en 1919. Varmaj vortoj de k-do Averkiev estis dediĉitaj al 71-a naskiĝtaga datreveno de J. Baghy. La 21-an de jan. okazis raporto en Esp-o de D-ro L. Kubasov pri medicino de la estonteco. La 28-an okazis vesperkunveno dediĉita al esperanta poeto Nikolao Hohlov (1891-1953 j.). La solenan vesperon ĉeestis krom ĉ. cent gekamaradoj ankaŭ filo de la poeto Leonido Hohlov. Parolon pri la vivo kaj esp-a agado de la poeto faris k-dino N. I. Nikiforova. Rememorojn pri la poeto eldiris D-ro K. Lavrentjev. kaj la filo de la poeto. Poste, oni ankaŭ deklamis versaĵojn de tiu karmemora poeto.

(Teodoro Kulagin, USSR)

Rostovaj Esperantistoj nun ĉiun lundon kunvenadas en la Domo de Sciencistoj, kie okazas la perfektigo en Esperanto, unu fojon en la monato okazas Esperanto-Universitato, gvidata de Docento Gruŝko. K-doĵ Mikaelo Segalĵ, fama Esperanto-veterano Genadiĵ Zalĵotov kaj Samson



Peonio.

Ĉinstila pentraĵo de Hu Ĝiekung



Kletenik instruas novajn kaj malnovajn adeptojn de la lingvo. Bonega kantistino Anna Voronova gvidas la artparton de la kunvenoj. Multaj rostovaj esperantistoj volontege korespondus kun siaj ĉinaj samlingvanoj. La adreso por korespondo estas: USSR. Rostov-Don 38. Pr. Lenina 95, kv. 53, Docento Gruško V. M. Oni tamen rifuzas korespondi pri bagatelajoj aŭ por interŝanĝi poŝtmarkojn! Korespondo pri porpaca agado, por interkompreniĝo kaj interamikiĝo estos arde akceptata.

(Gruško V. M. USSR)

En Erevan Celebrita 102-a Naskiĝa Datreveno de L. L. Zamenhof — De ses jaroj Esperanto estas instruata en la Erevana mezlernejo Ŝahumjan kaj tie la novaj kaj malnovaj geesperantistoj fondis Esperanto-rondon "Antaŭen", kiu komence de ĉiu lernojaro zorgas pri propagando kaj organizado de E-kursoj kaj vesperkunvenoj ktp. La 23-an de decembro, 1961, la rondo aranĝis vesperon dediĉitan al la 102-a Zamenhoffesto. La granda halo de la lernejo estis plenplena de spektantoj, inter kiuj estis ankaŭ reprezentantoj de lokaj gazetoj kaj radiocentro. Krom referatoj pri Zamenhof kaj "Esperanto kaj

Lernejo" troviĝis inter la programeroj ankaŭ kantado kaj deklamado en Esperanto. Grandan sukceson havis tiu vesperkunveno.

(S. Mkrtĉjan, USSR)

El Ĉeĥoslovakio

Poŝtmarko kun esperanta teksto aperis la unuan fojon en Ĉeĥoslovakio en la pasinta jaro. Oni eldonis ĝin okaze de la Tutmonda Filatelista Ekspozicio, kiu okazos en Praha de la 18-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro en la kuranta jaro. La esperanta teksto "tutmonda ekspozicio de poŝtmarkoj" troviĝas sur poŝtmarko de valoro 2 Kčs, kiu prezentas la novan fandfornegon de K. Gottwald en Ostrava-Kunčice. Ĝi estas presita en nigra kaj oranĝa koloroj.



La esperanta broŝuro "Juĝmem" — faktoj pri Ĉeĥoslovakio — eldonita en 1960 kun eldonkvanto de 5000 ekz. rapide elĉerpiĝis. Nun oni jam finpreparis novan pli riĉan eldonon por aperigo en la kuranta jaro. Ankaŭ la luksa esperantlingva "Gvidlibro Praha", eldonita en la pasinta jaro, estas disvendita intertempe.

Statistiko — Ĝis la fino de 1960 ekzistis sur la teritorio de ĈSSR entute 107 E-rondoj, la plimulto ĉe uzinaj kluboj. Dum la jaro 1961, la nombro de ili kreskis ĝis 113. Oni taksas, ke la nombro de la organizitaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio je 5000. Krome restas parto de unuopaj esperantistoj ekster organiza vivo.

Ĉeĥoslovaka Radio — Dank' al klopodado de ĉeĥoslovakaj kamaradoj stariĝis regula kunlaboro inter Ĉeĥoslovaka Radio kaj Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato. Ekde la 7-a de decembro 1961 fremdlingva disaŭdigo de Ĉeĥoslovaka Radio (fako por Aŭstrio) komencis elsendadi regule en Esperanto 6-minutan programon ĉiun lastan jaŭdon de monato, inter 18.45 kaj 19.00 (MET). Ĝiaj programoj temas pri la movado kaj literaturo de Esp., porpaca agado de esperantistoj ktp.

El Hungario

Studenta Klubo fondiĝis en la Budapeŝta Konkordo Grupo, Budapeŝt 11, Keleti Károly-u. 22., kiu serĉas interrilatojn kaj korespondantojn por 12-25 aĝaj gekna-

boj, aparte ankaŭ pri sporto kun ĉiuaĝuloj. Ĉu ekzistas ie fakvortaro por sportistoj kaj ĉu ie oni utiligas Esperanton ĉe sportistoj? Skribu multajn!

Ĉe la hungara junularo estas kreskanta intereso pri Esperanto. Tion pruvas instruadoj de prof. Botos kaj Kővári en Ujpest, prof. A. Pechán en tri klasoj de teknika mezlernejo en Budapeŝt, infankursoj por pioniroj sub la gvido de Pechán kaj Balkányi, kursoj en fervojistaj edukejoj. En Szeged estas 5 kursoj por komencantoj. Ankaŭ en aliaj urboj estas similaj aranĝoj.

Premio pro HEM. — La ĝenerala kunsido de la Hungara Esperanto-Asocio premiis per 500 forientoj prof. Ernő Farkas pro lia granda laboro por preparo, aranĝo kaj administrado de la Unua Hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj somera dokumenta ekspozicio, kion multe helpis per taŭga materialo la IEMW.

Du Kongresoj Atendas Vin — Al la 14-a Internacia Kongreso de IFEF (fervojistoj) en majo kaj al la jubilea landa Esperanto Kongreso en julio oni atendas partoprenon de multaj eksterlandaj gastoj. Ambaŭ kongresoj okazos en la bela hungara ĉefurbo kun interesaj programoj kaj ekskursoj. Okaze de la IFEF-kongreso oni esperas aperon de nova esperanta poŝtmarko en Hungario.

La Unua Internacia Konferenco Esperanta de Sciencistoj

Sub la aŭspicio kaj en la kadro de la 47-a Universala Kongreso de Esperanto, en Kopenhago estos aranĝita de la Internacia Scienca Asocio Esperantista la Unua Internacia Konferenco Esperanta de Sciencistoj, kiu okazos de la 5-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1962. La celo de tiu ĉi Konferenco estas studi la lingvan problemon en la scienco. Raportetoj pri konkre-

taj terminologiaj problemoj, pri konkretaj ebloj por apliki Esperanton en scienca laboro kaj pri malutilo de lingva diverseco en sciencaj konferencoj de diversaj sciencaj fakoj estas bonvenigataj. Ankaŭ neesperantistaj sciencistoj estas kore invitataj partopreni la Konferencon aŭ kontribui raportetojn kondiĉe ke ili estu en Esperanto. Jen estas la adreso de la Konferenco: 47-a Universala Kongreso de Esperanto, Scienca Konferenco (klare indiku tion ĉi sur la koverto), Kopenhavn, Danlando.

Finnaj Sciencistoj Favoras Esperanton

Por kuraĝigi aplikon de Esperanto en scienca laboro, 22 sciencistoj el Finnlando esprimis sian opinion en komuna letero, ke Esperanto plej bone servos por internacia scienca informado. Inter la subskribintoj estas prof. Paavo Ravila, eksrektoro de la

Universitato de Helsinki kaj prof. Yrjö Väisälä, emerita prof. de astronomio kaj fiziko en la Universitato de Turku kaj la eksprezidanto de la Scienca Akademio Finna prof. Vilho Väisälä.
(Vilho Setälä)

Ankaŭ en Aŭstria Lernejo Esperanto Estas Instruata

La Aŭstria Esperanto-Federacio informas, ke estas organizitaj du oficialaj Esperanto-kursoj por gelernantoj el la ĉeflernejoj de Graz. Esperanto estas instruata kiel nedeviga lernobjekto dum du horoj semajne. La gelernantoj ne pagas la instruadon, ĉar la honorariojn pagas la ĉefa lernejinstanco de Graz.


Plue la aŭstria ministerio por instruado decidis doni subvencion de 1000 ŝilingoj al la Aŭstria Esperanto-Federacio.

(IGS/464)

Korbopilka Konkurso

de Miaŭ Di

1. Ek!
2. Ne gardeble.
3. Venkodecida golo!



Sur Nia Librobreto

Franjo Tu Haŭ, verko de Bui Duc Ai, eldonita de Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, Vjetnamio en 1961, 192 p., broŝuro 19 × 13 c.m. Tradukis Nguyen Minh Kinh kaj Nguyen Minh Tung.

Mi fermis la libron leginte ĝian lastan paĝon. La figuro de Franjo Tu Haŭ, heroino de la novelo, ĉiam pli grandiĝas antaŭ mi kaj vivas en mia memoro tiu batalantino kaj patrino longe ne forgesbla kune kun ĉiuj ŝiaj noblaj agadoj.

Orfino, servantino kaj poste akuŝistino. La patro mortis pro disrompiĝo de acidplena barelo dum transportado. Ŝin seksatencis franca leŭtenanto kaj ŝiajn infanojn ili forrabis. Ŝia edzo brave mortis kontraŭ atako de la malamiko. Mortis vundite de la malamiko ankaŭ ŝia bopatro amata kiel ŝia propra patro. . . . Komence de ŝia kontraŭstaro ŝi hezitis. Sed iom post iom ŝi fariĝis decidema, hardite en severaj bataloj. Profitante la profesion de akuŝistino ŝi aktive faris revolucion propagandon spite ĉiajn suferojn.

La libro vere kortuŝis min. Ĉu homoj submetataj al kruela regado de la fremda kaj interna malamikoj povas longe toleri sen reago? La historio de Tu Haŭ tion bone respondis. Tiel respondis eĉ simpla virino kia Onklino Ba zorganta pri la infanoj de Tu Haŭ. Kiam Tu Haŭ volis ŝin rekompenci per mono, ŝi rifuzis dirante:

“Mi ne faras la metion de var-tistino! Mi zorgas pri komuna afero. Tial ke mi ne estas kapabla fari vian taskon, mi vin anstataŭas por varti viajn etulojn. Tia estas mia devo!”

Mi finlegis la novelon ĵus post kiam mi aŭdis de radia informo ke en Suda-vjetnamio, kie Tu Haŭ naskiĝis kaj bataladis, la malamikoj—nun ne francoj sed usonanoj kaj ĝiaj lakeoj—ekatakis la popolon. Do, la sudvjetnamaj gefratoj devas ankoraŭfoje travivi la vivon de Tu Haŭ por rikolti plenan venkon de la tuta vjetnama popolo.

Zensto

La Kunmetitaj Verboformoj, vol. I, II—kolektoj de artikoloj de Teo Jung pri la “absurda ATA-ITA-problemo”. Formato: 14.5 x 10 cm. Vol. I 55 p., vol. II 30 p. eldonitaj de *Heroldo de Esperanto*.

La Zamenhofa Esperanto. Simpozio pri -ata/-ita—originale verkis dek famaj esperantistoj inkluzive K. Kalocsay, G. Waringhien, Kovrilo de Johan Hartley. Eldonita de Stafeto, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1961. Formato: 22.5 x 15 cm. 338 p. Prezo: 3 usonaj dolaroj.

Jen libroj kun malsamaj titoloj, de malsamaj ampleksoj kaj malsamaj aŭtoroj tamen pri la sama ATA-ITA-problemo kaj kun la sama celo, nome defendi la Fundamenton de Esperanto kaj savi la internacian lingvon de dissplitiĝo.

“Responde al ripetitaj kritikoj pri la aplikado de la kunmetitaj verboformoj” laŭ la “logika, samensa, simetria sistemo” de la senaspektistoj aŭ at-istoj, Teo Jung publikigis serion da artikoloj en *Heroldo de Esperanto* por sin defendi kaj malrekomendi la “oblikvan vidpunkton” de la aspekt-istoj aŭ it-istoj, kaj li asertis, ke ĉi tiuj malobservas la

Fundamentan Gramatikon de Zamenhof, ke Zamenhof mem erare uzadis sian lingvon sub la influo de la slavaj lingvoj kontraŭ la Fundamenta Gramatiko, kiun li mem kreis por sia lingvo internacia. Pli poste, Teo Jung represis tiujn artikolojn en la supre anoncita *La Kunmetitaj Verboformoj*. Por repliki “fortan defion kontraŭ la zamenhofa esperanto” de Teo Jung k.a. at-istoj, J. Regulo Perez organizis simpozion, kies partoprenantoj klopodis montri la “nelogikecon de la at-ismo” per solidaj argumentoj kaj abundaj ekzemploj, por ke la at-istoj submetiĝu al la “Fundamento” kaj “reeniru la leĝecon”, ke La Zamenhofa Esperanto estu respektata kaj ne distordita aŭ reformita.

Do ambaŭ verkoj estas “replikaĵoj” kaj celantaj la samon, nome helpi siajn samlingvanojn, kvankam en neniun el ili mankas iom tro varmaj pik-mokaj vortoj, kiuj povus esti ŝparitaj por ke la oponentoj ne fariĝu surdaj al racia rezono pro korflamiĝo. Kvankam mi persone inklinas sekvi la lingvouzojn de Zamenhof kaj dividas la saman starpunkton de la it-istoj, mi tamen ne trovas la artikolojn de Teo Jung tiel erarigaj por ne diri danĝeraj. Ambaŭ *La Kunmetitaj Verboformoj* kaj *La Zamenhofa Esperanto* estas legindaj, ĉar ili povas nin helpi pli profunde koni nian lingvon. Pristudo, diskuto—korekta konkludo. Mi kredas, ke Esperanto jam estas sufiĉe forta por supervivi gripo aŭ krupon, kaj iom da luktoludo povas nur utili al ĝia sano kiel pano kaj bano. Mi forte rekomendas ĉi tiujn du librojn al ĉiuj seriozaj esperantistoj, kaj mi kredas, ke ili ne trovos sin

trompitaĵoj se ili havigos al si kaj trastudos ĉi tiujn prilingvajn verkojn. Mi aldonu, ke ili estas ne nur enhance sed ankaŭ lingve altkvalitaj legaĵoj.

V. Kanto

Pri la menciita problemoj oni verŝis jam sufiĉe multe da inko. Tamen por movado kia de lingvo internacia, sed ne iu skola akademio, estas utilaj la saĝaj vortoj de ĉinaj antikvuloj, ke komunecon oni trovu, kaj la diferencon flanken metu. La plej urĝa tasko de nia movado nuntempa estas tio ke Esperanto estu ne nur eŭropa, kiel ĝi ĝis nun esence estis, sed vere internacia, t.e. vaste akceptita ankaŭ en neeŭropaj landoj. Ĝia logikeco, klareco kiel montrita en la Plena Gramatiko de 16 reguloj tion heplis. Ĉiaj personaj eksplikoj kaj aplikadoj devas resti personaj anstataŭ pretendi la sole pravajn, ĉar la vasta internacia praktikado finfine sankcios ĉion sankciindan.

La Red.

Kantu Kune — Kantaro kompilita de Roman Dobrzyński kaj Tadeusz Jarzecki, eldonita de la Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio. Kovrilo projektita de Zofia Zielińska. Formato: 11.5 x 16.5 cm. 48 p. Prezo: 0.35 Us. dolaro aŭ 5 steloj. Aĉetebla ĉe Ars Polona str. Krakowskie Przedmiescie 7, Warszawa, Pollando aŭ UEA. Jen belaspekta poŝformata broŝuro kun 21 muziknotohavaj kantoj, inter kiuj troviĝas ne nur belaj kantoj tradukitaj sed ankaŭ pluraj originalaj inkluzive de *La Espero*. Malgraŭ kelkaj eraretoj kaj ne tre klare presitaj notoj, la kantaro restas tre bonvena por niaj kantemuloj.

V. K.

Ernst Olsson: Kredo, Floroj kaj Dinamito — libreto enhavanta tri biografiajn rakontojn pri Birgitta, sanktulino en la Nordo, pri Linnaeus, la reĝo

de la floroj, fondinto de la moderna botanika scienco, kaj pri Nobel, la inventinto de dinamito kaj iniciatinto de la nobelpremioj. Al mi, nekredanto al religioj, interesas nur la du lastaj rakontoj. La rakontoj verkitaĵoj per simpla kaj konciza stilo estas sufiĉe interesaj. La libreto pruvigas ke por la sukceso de nova ideo eĉ scienca necesas longa kaj senlaca batalo. Ĝin redaktis Gösta Henriksson kaj eldonis Eldona Societo Esperanto, Fack 7043, MALMÖ 7, Svedujo. Prezo: Bind. sv. kr. 8:50, Broŝ. sv. kr. 4:75.

H.

Belarto — Aldono al la revuo *Esperanto*, samformata kiel la revuo mem, 78 paĝoj plus kovriloj. Redaktis W. Auld. Aĉetebla ĉe UEA.

Lastatempe, la organo de UEA donas ĉiam pli grandan spacon al literaturaj verkoj, kaj tiu ĉi kolekto de belartaj verkoj atestas pri ankoraŭ pli granda intereso tiuflanka. En tiu ĉi kolekto troviĝas ĉ. 10 rakontoj, 20 poemoj kaj 10 felietonaĵoj pri pentrarto, literaturo, lingvo ktp. Ili estas el plumoj de okcidentaj kaj orientaj verkistoj, kaj tre variaj ili estas en formo kaj stilo. Kvankam la plejparto de ili estas iom fremda por mia gusto, mi tamen trovis en la kolekto ankaŭ pecojn interesaj. Kredeble ankaŭ aliaj samideanoj akiros ion legindan en ĝi. Krom la artikoloj ĝi enhavas ankaŭ multajn bildojn kaj vinjetojn. Ankaŭ el ili eble oni trovos iujn nelaŭgustajn, tiam mi konsilas ke oni ŝparas rigardon al ili.

Koncerne al la lingvo de la tradukaĵoj, kiuj konsistigas plejparton de la enhavo, kaj originalaĵoj mi povas diri preskaŭ nur laŭdojn. Ja bone konata estas plejparto de la kontribuantoj, nome H. Dresen, W. Auld, Miyamoto Masao, Vilho Setälä, J. S. Dinwoodie k.a. Nur la jenaj esprimoj ŝajnas al mi iom strangaj:

Georgo Deŝkin:

Al 72-a Aprilo

*Ah, brilas suno iel nove,
vi ebruiĝas min, April!
Vi paŝas milde, facilmove,
de ĉiuj zorgoj vi — azil!*

*Kaj kvankam 72-an fojon
mi vidas vin en suna lum' —
en kor' vi vekas junan ĝojon,
foriĝas tristo, kiel fum'!*

*Kaj antaŭ pord' malfermiĝinta,
el kiu venas Primaver'*
mi ne bedaŭras pri pasinto,
sed benas ĉion kun sincer'!*

1962 j.

* Primavero = printempo

profunde dormanto, ankoraŭ-ne-aŭroro, grenkulto, kelkuloj. Ĉetero, estus pli bone por la legantoj, se oni estus enpresinta ankaŭ necesajn klarigojn pri neologismoj kaj mallongajn notojn pri la verkintoj.

V. K.

Inĝ. Mario Simondetti: Kiamaniere Distingi la Fungon? — Kiel montrita de la titolo, ĝi estas libreto pri tiu speciala fako kaj originale verkita. En la libreto la verkinto klasifikis la fungojn kaj detale determinis iliajn karakteraĵojn. La celo estas ke oni distingu la venenajn de la manĝeblaj kaj ke la natura riĉaĵo estu bone utiligata por nia nutrado sen risko de veneniĝo. La libro estas rekomendinda al ĉiuj interesiĝantoj kvankam la traktitaj specoj limiĝas je la fungoj kreskantaj en Eŭropo. Prezo: 10 steloj. Mendebila ĉe la verkinto. Adr: Inĝ. Mario Simondetti, via Staurengi, 24, Italio.

H.



Ĝuang-naciaj virinoj vizitas foiron.

De Deng Erlong

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

Pli ol Ducent Ensembloj Fonditaj

Nun, en Ĉinio troviĝas pli ol 200 ensembloj kun pli ol 1000 profesiaj gedancistoj. La ensembloj ĉiuj fondiĝis en la pasintaj dek du jaroj. Pli ol 90% el la junaj geartistoj de la ensembloj estas eledukitaj de la danc-lernejoj de Pekino, Hingiang kaj aliaj lokoj. Tiuj ensembloj ofte prezentas programojn en fabrikoj, minejoj kaj vilaĝoj kaj rikoltas varman aplaŭdon. Ili jam disvolvis la nacian dancon kiel sintezan arton de danco, muziko kaj dramo. Fondiĝis jam la unua ĉina baled-ensemblo, kaj oni lernis multajn dancojn kaj kantojn de landoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko.

Katolika Soleno de Konsekrado de Episkopoj Okazis en Pekino

La Ĉina Katolika Patriota Asocio okazigis la 21-an de jan. en Pekino la solenan meson por konsekrado de la episkopoj. La ceremonio estis prezidata de ĉefepis-

kopo Pi Ŝusi de la Ĉina Katolika Patriota Asocio. Li donis tie la sanktan povon al sep nove elektitaj episkopoj. La tuta ceremonio daŭris pli ol 3 horojn. La katolika eklezio en Ĉinio jam sin liberigis paŝon post paŝo de la superkontrolo de Vatikano tuj post la Liberiĝo en 1949 kaj praktikas la principon de sendependeco per memdirektado de la ekleziaj aferoj. Tamen la organizado de la konsekrado de episkopoj kun partopreno de 5 diocezoj ĉiuj kune ja estas la unuafoja.


Nova Vidindaĵo en Gujlin

La pejzaĝo en la regiono de Gujlin, ĉefurbo de Guangxi jam delonge estas rigardata kiel la plej bela en la tuta lando. Lastatempe multaj homoj estas allogataj de la nove malkovrita Kaverno de Ludijan, kiu situas en la monto nord-okcidente de la urbo. La kaverno estas plena de belegaj vidaĵoj el groteskaj stalaktitoj kaj stalagmitoj multformaj kaj riĉkoloraj. Sur la muro ankoraŭ konserviĝas skribaĵoj kaj versoj k.c. de vizitintoj el malproksima

estinteco ekde 792 p. K. ĝis 17-a jarcento. La vortoj montras ke ĝi servis kiel fuĝejo de la lokaj loĝantoj por eviti militajn katastrofojn. Sed poste la kaverno estis ial fermita ĝis kiam ĝi estis denove malkovrita en 1959. Nun ĝi remalfermiĝis al la publiko post riparado kaj fariĝis plia vidindaĵo de la regiono.

Anonco

Pola Skolta Asocio en la urbo Bydgoszcz okazigos Unuan Regionan Skoltan Kunvenon dum la Internacia Tago de Infano. La Kunveno daŭros de la 1-a ĝis la 4-a de junio 1962, kaj ĝin partoprenos ĉirkaŭ 10,000 geskoltoj. Esp-istoj el la tuta mondo sendu bildkartojn kun salutoj. La bk estos montritaj en speciala ekspozicio. Ĉiuj sendintoj ricevos eldonitan okaze de la Kunveno en Esp. bildkarton kun filatela stampo en Internacia Lingvo. Bonvolu nepre skribi al: La Regiona Skolta Kunveno, Komonda Choragwi Z.H.P., BYDGOSZCZ, str. Dworsowa 56, Pollando.



Korespondi Deziras

* Esp. Meksika Asocio traslokiĝis al Av. Madero 8—312, Mexico 11, D.F. Ĉio por la asocio sendu al la nova adr.

* Milan Neubeler, 29-jara, Poprad 4, Širókeho 791, ĈSSR, kun ĉl.

* Thomas Nilsson, 19-jara, botanisto, Viggbyholm, Tallvägen 7, Svedio, kun ĉl.

* Szilágyi Dezsó Dezidero, Oláh Károky u 25 sz, Debrecen, Hungario, pri la vivo, kulturo k historio de aliaj landoj.

* A. N. Ĥovanskij, Kommunističeskaja 84-23, Joŝkar-Ola 2, Mari ASSR, USSR — docento de pedag. inst. — pri matem. k kult. aferoj kun ĉl.

* Antanas Rimkus (instruisto), USSR, Litovio, PLUNGĖ, Parkas 2, dez. kor. kun ĉl. pri ĉt. k serĉas gekores-ojn por siaj gelerantoj.

* S-ro Michel CARRIERE RIVES, 280 av. d'Argenteuil ASNIERES (Seine), Francio, Prez. de Esp. Grupo k staciestro ĉe Pariza Subtera Ferv. dez. kor. kun junulinoj el Ĉinio, Pollando, Japanio k aliaj aziaj 1. pri vivmaniero, kutimoj.

* F-ino Raymonde COSSON, 4 Rue Georges Bizet MERIGNAC (Gironde), Francio, dez. gekores-ojn en ekstremoriento.

* S-ino Beatrice Curchod, Rue du Valentin 45 en Lausanne, Svislando, gv-tino de esp. kurso, dez. trovi gekores-tojn por siaj gelerantoj.

* Riho Joassoone (instruisto, 48-jara), Matsuri s.-jsk., Polva r., Estona SSR, USSR, dez. kor. kun instruistoj de aziaj k afrikaj landoj. Resp. garantiata.

* Pri esp sport-vortaro k pri utiligo de Esp. en sporto, k pri interesaj sport-okazintaĵoj petas sciigojn prof. de hungara korp-educ-sciencia instituto. Adr: Istvan Laszlo, Budapest XII. Boszormenyi ut 42.

* Masao Yoshimoto, instruisto, dez. interŝ. element- aŭ mezlernejajn lernolibrojn, fotojn pri geknaba vivo, infan-desegnaĵojn, informojn pri instruado de malsanaj geknaboj en sanatorio. Adr: No. 27 Nishijunnain-cho, Sai ukyo-ku, Kyoto, Japanio.

* Maria Vojnovics, teknika desegnistino, Budapest, XX Maroth u 60 s2, Hungario, dez. interŝ. bk.

* Vietnamaj lernantoj dez. kor. kun tutmondaj gejunuloj. Niaj adresoj: Vũ Thach, trúõng CẤP III ý-yên, Nam-dinh. Doan cong-tiñh, 17d, Khu-già ciñh công, nhân dêt, Nam-dinh. Thuñg-gia Thê, 29e, khu gia diñh dël, Nam-dinh, Dác-tiñh, 17d Khu gia diñh dël, Nam-dinh.

* S-ro Eerik Lundava (21jara) Metsa 25-4, Estonio USSR, kolek-tas a-etiketojn pk. il. k kor. esp. k ruse.

* Osvětový Dùm, Esp. Rondo, Kojetín, Ĉeĥoslovakio, dez. interŝ. fotojn el naturo.

* Ohalmi Jozsef, IV., Arany Janus u. 11. Budapest, Hungario, sendos glumarkojn po paketo kontraŭ 3 resp. kup. Ankaŭ interŝ.

* S-ro Hans Khler Hansen, instruisto, dez. kor. kun ĉinaj gesanoj, Adr: Valby Langgade 86 C,3 tv. Kopenhago Valby, Danlando.

* Ŝatas kor. kun gesanoj el orientaj landoj, precipe Ĉinio, Japanio, Vietnamio, interŝ. bk k neuzitajn pm., Helena Hrudkova, Lvolen, Krupinska cesta 1157, Ĉeĥoslovakio.

* S-anoj! Mi abonas por vi "Hungara Vivo"n kontraŭ malnovaj esp. libroj. Ladislao Somlai, Budapest, V. Bajesy Zs. ut 40. Hungario.

El POPOLA
CINIO
人民中国报道

Dumonata Gazeto
eldonata de Ĉina
Esperanto-Ligo

Redakcio:
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Administracio:
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Enhavo de N-ro 3 (74) 1962

Bildo sur kovrilo — Trinku!
Mi Ekkonis Mian Mision en la
Kvindeka Jaro
Rondvizito al Historiaj Lokoj
en Interna Mongolio
Sur Vojo Kovrita per Freŝaj
Floroj
Dimanĉo de Pekino
La Muzeo de Ĉina Historio
Urbo de Floroj kaj Muziko
La Centra Instituto por Nacioj
Du Boteloj da Vino
Kurso pri Masaĝo por Blinduloj
Kurararbo
La Artaĵoj de Jad-birdisto
Ĝang
Sur la Paŝtejo (*du poemoj*)
Pri la Drakboata Konkurso
Praktike Aplikebla Finludado
(Ĉina Ŝako)
Mateno en Universitata Urbo
Rakontoj pri Afanti
"Belaj Floroj" (*Filmo*)
Esperanto Marŝas
Sur Nia Librobreto
Al 72-a Aprilo (*poemo*)
Korespondi Deziras
Bildo sur dorskovrilo — Sun-
leviĝo (Ĉinstila pentraĵo de
Hju Si)


Printempo de la Vivo

Ĉarmas

per

Buntaj Koloroj

1. Malgranda tablotenisisto.
2. Kiel seriozaj ili estas!
3. Demonstrado.
4. Ĝus vekiĝinte.





Sunleviço.

Êinstila pentraço de Hju Hi